

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

11  
2000

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA


KUL

Esp.  
v. - 19034/2000



**Revenis hejmen elafuroj**  
**Jarcenta maljunulo – Karl Maier**  
**Nia prelega vojaĝo en Eŭropo**

# ★ POPOLA ĈINIO



Neĝlando 24



Vidindejo  
Shahu 34



Ludo de  
kuraĝuloj 14

Produktejo  
de verdaj  
agrikulturaĵoj 29



17

Revenis  
hejmen  
elafuroj



### 3 INTER NI

4 Jarcenta maljunulo – Karl Maier

8 Nia prelega vojaĝo en Eŭropo

### 10 50 JAROJ – EPĈ:

Esperanto, Ĉinio kaj mi... triangula amrilato;  
EPĈ-leganto de 42 jaroj en Vjetnamio

12 Tago de Josef

### 16 KORESPONDI DEZIRAS

### 32 JUNULARO:

Inter IJK kaj UK

36 Bela spektaklo en universitato

### 37 KURANTAJ AFEROJ

### 38 EL ĈINAJ GAZETOJ

### 40 ESP-NOVAĴOJ

### 41 ORDINARAJ ĈINOJ:

Maniuloj de teleregaj modeloj

44 Nacimalplimulta urbo Jishou

46 Drivo sur Maoyan-rivero

### 47 ORIGINALE VERKITAJ:

Tri poemoj

### 48 POR KOMENCANTOJ:

Malavantaĝo aŭ avantaĝo?

### 49 POR VIA SANO:

Bano utilas al sano

### 50 SUR NIA LIBROBRETO:

Lotus-lanterno; La Familio; Cent Ĉinaj Fabeloj

### 51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:

Bambuoj



En Neĝa Vilaĝo  
Foto de Liu Sigong

Estas malgranda vilaĝo en la provinco Heilongjiang, nordorienta Ĉinio. Pro la apartaj geografio kaj klimato tie multe neĝas de oktobro ĝis majo de la sekvanta jaro. Tiam la vilaĝanoj pendigas ruĝajn lanternojn sur la pordo de sia domo kaj tio aldonas romantikan etoson al la vilaĝo, kiun oni nomas Neĝa Vilaĝo.

### EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de “El Popola Ĉinio”

Distribuata de Distribua Fako de “El Popola Ĉinio”

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

## INTER NI

En ĉi tiu numero la artikolo “Revenis hejmen elafuroj” prezentas elafurojn, kiuj estas raraj kaj propraj al Ĉinio. Estas interese, ke ili havas kapon similan al tiu de ĉevalo, voston similan al tiu de azeno, hufojn similajn al tiuj de bovo kaj kornojn similajn al tiuj de cervo. Sed antaŭe ili spertis malfeliĉon kaj estis forportitaj de fremdlandanoj. Nun ili revenis hejmen. Fakte la ĉinaj trezoroj perditaj estas nekalkuleblaj. Kompreneble, nun la perdo ankoraŭ okazas, kaŝe anstataŭ malkaŝe. La artikolo “Inter IJK kaj UK” havas viglan kaj malpezan stilon de verkado kaj estas facile legebla. Maljuna germana esperantisto Karl Maier profunde amis Esperanton kaj EPĈ. Ni estas kortuŝitaj de tio. La artikolo “Jarcenta maljunulo — Karl Maier” montras nian estimon kaj sopiron al li.

La Red.

11[506]2000



# Jarcenta maljunulo — Karl Maier

Li staris senmove kvazaŭ statuo kaj direktis sian rigardon al malproksimaj vagonoj. La sceno forte kortuŝis min, ke mi ekmemoris la faman ĉinan eseon "La dorso de la patro" temantan pri la delikata kaj profunda amo de la patro al la filo, kaj larmoj nebuligis miajn okulojn.

de TAN XIUZHU\*

**S**-RO Karl Maier, granda amiko de la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj, forpasis la 25-an de julio 2000 en sia aĝo de 99 jaroj. Ni ege malĝojas kaj bedaŭras pro tio. Ni promesis al li, ke ni iamaniere celebros lian centjariĝon februare de la venonta jaro. Sed tiun ŝancon ni neniam havos. Mi vidis s-ron Karl Maier nur dufoje, tamen tiuj du renkontiĝoj profunde gravuriĝis en mia memoro.

## LA UNUA RENKONTIĜO KUN KARL MAIER

Mi unuafoje vidis s-ron Karl Maier en septembro 1987 en la hejmo de Ivan Ko, lia malnova ĉina amiko. Kiam mi vidis lin kaj lian edzinon, mi neniel povis kredi pro ilia bela kaj eĉ brila vestado, sprita parolado kaj facila paŝado, ke ili jam havis 86 kaj 78 jarojn. Jam en 1966, nelonge post kiam mi venis al la redakcio de EPC, mi aŭdis de Ivan Ko la nomon Karl Maier kaj informiĝis de li, ke Maier estas peranto de EPC de 1958 kaj la nombro de liaj varbitoj superis 300 en 1961, pro tio la redakcio de EPC planis inviti lin vojaĝi al Ĉinio en 1966. Sed la vojaĝo ne sukcesis ĝis 1987. Mi ne sciis, kiu alia kaŭzo

estas krom la kultura revolucio, kiu daŭris dek jarojn en Ĉinio.

S-ro Karl Maier konatiĝis kun Ivan Ko en ĉina urbo Tianjin en la tridekaj jaroj. Tiam s-ro Karl Maier funkciigis en Tianjin dentologian kuracejon kaj Ivan Ko laboris en iu asekura kompanio. Ili ofte renkontiĝis en esperantistaj kunsidoj kaj starigis inter si profundan amikecon. S-ro Karl Maier instruis foje en Esperanta kurso prononcado de nia lingvo. En 1955 li kaj lia edzino revenis al sia patrolando GDR kaj ankaŭ s-ro Ivan Ko

forlasis Tianjin por labori aliloke jam en la komenco de la kvindekaj jaroj. La revidiĝo post pli ol 30 jaroj ege ĝojigis ambaŭ maljunulojn. En Pekino, krom akompani ges-rojn Maier al vidindaĵoj kaj amikoj, Ivan Ko hejme regalis ilin per familia bankedo, al kiu estis honore invititaj mi kaj filino de la komuna amiko de Karl Maier kaj Ivan Ko. Tiutage la malforta edzino de Ivan Ko mem preparis por la gastoj abundajn pladojn de loka gusto kaj la gefiloj kaj nepino de Ivan Ko alrapidis por



S-ro Karl Maier (maldekstre en la unua vico) en la 84-a UK



la intervidiĝo. La du ĉambroj de Ivan Ko estis tro malgrandaj por tiom da homoj, sed la etoso varma kaj intima.

Dum tiu vojaĝo, krom Pekino, ges-roj Maier vizitis ankaŭ siajn malnovajn loĝejon kaj kuracejon en Tianjin kaj havis tie tre agrablan renkontiĝon kun amikoj malnovaj kaj novaj. Ili vizitis ankaŭ Nankinon, Ŝanhajon, Suzhou kaj Hanzhou. La vojaĝo daŭris tri semajnojn.

## INTER DU MALSAMLANDAJ MALJUNULOJ

En la interparolado kun s-ro Karl Maier mi hazarde informiĝis, ke mia japana koresponda amiko s-ro Osaki Kazuo estas amiko ankaŭ de Karl Maier. Mi tuj skribis tion al s-ro Osaki Kazuo. Li respondis en la letero: "En 1932 survoje al Ĉinio Karl Maier alvenis al Osaka kaj tranoktis en mia dometo. Lia sinteno tre kortuŝis min. Li ne drinkas, ne fumas, nek kredas Dion. Tiele amikeco okazis inter mi kaj li." Sed ilia kontakto rompiĝis pro

la milito de japanaj agresantoj kontraŭ Ĉinio. Eble mia letero helpis al ili denove havi la kontakton. Nelonge post tio s-ro Osaki Kazuo sendis al mi 5 000 jenojn, ke mi aĉetu anstataŭ li donacon al ges-roj Maier. Per tiu sumo mi zorgeme elektis por ili belajn tablotukon kaj silkon kaj poŝte sendis al ili. Post iom da tempo mi ricevis leteron skribitan de s-ino Maier, en kiu ŝi en la nomo de ŝi kaj ŝia edzo esprimas koran dankon al mi kaj sentoplene rememoris la feliĉajn tagojn, kiujn ili pasigis kun ĉinaj amikoj dum sia revizito al Ĉinio. Ŝi kunsendis al mi tri fotojn. En la fotoj ŝi portas robon faritan el la silko aĉetita de mi kaj ambaŭ sidas malantaŭ la tableto tegita per la tablotuko aĉetita de mi. La samaj fotoj estis senditaj al s-ro Osaki Kazuo. Por havi bonajn fotojn ges-roj Maier venigis fakan fotiston, sed la koloro de la fotoj ne estis kontentiga kaj pro tio s-ino Maier ege bedaŭris. Rememorante la aferon, mi sentas kaj ĝojon kaj kontenton, ĉar mi restarigis la rompitan kontakton kaj amikecon de la malsamlandaj maljunuloj.

## GASTADO EN LA HEJMO DE KARL MAIER

La 84-a UK okazis de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 2000 en Berlino, al kiu mi aliĝis. Mi kaj miaj kolegoj decidis viziti Karl Maier profitante la okazon. Antaŭ nia ekiro al la kongreso mi skribis al li, informante nian deziron kaj demandante, kion ni kunportu al li. En sia letero li respondis: "Mi vere ĝojus, se vi trovus tempon viziti min, sed mi petas vin ne alporti iun ajn donacaĵon por mi. Vi estu la donacaĵo!" Li daŭrigis: "Mi jam komencis prepari por mia forpaso kaj tion kio ne havas utilon por alia homo mi jam forĵetis ofte ne sen larmoj en miaj okuloj." Lia lasta vorto tristigis min.

S-ro Karl Maier ĉeestis la malfermon de la kongreso. Tiutage li vestis sin ĝentile kaj sidis nerimarkite kun s-ro Ulrich Lins inter la postaj vicoj de la kongresejo. Sed en sia saluta parolado s-ro Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA, laŭte

menciis lian nomon, lian rilaton kun Ĉinio kaj E P Ĉ kaj kontribuon al la germana Esperanto-movado. La tuta ĉeestantaro esprimis estimon al li per varma aplaŭdado.

Post la inaŭguro s-ro Karl Maier ĉeestis la kunsidon de EPC-legantoj. Kvankam li restis silenta dum la kunveno, tamen ni ne dubis lian varman koron al EPC, ĉar li estis tre diligenta kaj sukcesinta peranto de la revuo kaj zorgeme kolektis



Geedzoj Maier (ĉe la fronto) gastantaj ĉe s-ro Ivan Ko (la dua de maldekstre)

kompleton da ekzempleroj de EPC, inkluzive de ĝia unua numero.

La 3-an de aŭgusto mi kaj miaj kolegoj iris viziti lin. Li diris, ke li atendos nin tiutage en la stacio. Ĉu ni povus lasi fari tion la 98-jaran maljunulon! Ni fordankis lian afablecon kaj ripetfoje klarigis al li, ke ni havas sufiĉe da saĝo por atingi lian hejmon laŭ la adreso. Sed tuj kiam ni per trajno atingis la stacion, mi vidis je kaplevo s-ron Karl Maier sur ponto super la fervojo. Li staris senmove kvazaŭ statuo kaj direktis sian rigardon al malproksimaj vagonoj. La sceno forte kortuŝis min, ke mi ekmemoris la faman ĉinan eseon "La dorso de la patro" temantan pri la delikata kaj profunda amo de la patro al la filo, kaj larmoj nebuligis miajn okulojn.

En sia apartamento plena de ĉinaj mebloj kaj artaĵoj s-ro Karl Maier regalis nin per teo kaj kukaĵo. Li detale demandis nin pri siaj malnovaj amikoj kaj laŭ nia peto rakontis pri siaj travivaĵoj: mizera infaneco, konatiĝo kun sia edzino, batalo kontraŭ nazioj, migrado tra Usono, kie li vidis la "ekonomian miraklon" kaj ankaŭ senlaborecon, interparolis kun indianoj kaj foje estis tre proksima al morto pro aventuro en Granda Kanjono de Kolorado, restado en Ĉinio kaj kontaktiĝo kun ĉinaj esperantistoj, la vivo en GDR post 1955... Demandite kial li ne sukcesis viziti Ĉinion dum tiom longa tempo, li diris, ke pro sia subteno al Ĉinio en la konfliktoj inter Ĉinio kaj Sovetunio, li estis eksigita el la Unuigita Sociala Partio de Germanio, sed kiam normaligis la rilatoj inter Ĉinio kaj GDR oni ne fidis lin pro lia tiutempa opono kontraŭ la registaro. Lia vizito al Ĉinio fine realiĝis en 1987 post la Varsovia UK. Per sia rakontado li kvazaŭ donis al ni enhavoriĉan lecionon de historio.



S-ro Karl Maier kaj lia edzino ĉe la tableto tegita per la donacita tablotuko

## AMIKECO DE KARL MAIER POR ĈINIO

Eble pro la 22-jara restado en Ĉinio s-ro Karl Maier havis profundan amikecon por la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj, kaj tiun amikecon provis la tempo. Li ne nur bone konis la pasintecon de Ĉinio, sed ankaŭ zorgis ĝian hodiaŭon kaj futuron. Li aĉetis multajn librojn pri Ĉinio.

Januare ĉi-jare, en sia letero al mi li skribis: "Estas ĉiam granda evento en mia kvieta vivo, kiam ĉina amiko venas al mia hejmo. Kelkfoje membroj de la ĉina konsulejo ĉi tie vizitas min kaj preparas ĉinan manĝon en mia kuirejo aŭ kunportas manĝon, tio estas kvazaŭ festo por mi." Februare en sia lasta letero al la redakcio de EPC li skribis: "Kun granda ĝojo mi legis vian belegan kaj karan gratulleteron okaze de mia 99-a naskiĝtago. Neniam mi havis tiom multajn subskribojn en letero al mi. Mi precipe ĝojas pri la subskribo de mia plej longa korespondanto Ivan Ko, de kiu mi ne havis vivsignon de la nova jaro. Mi plej kore dankas al vi ĉiuj pro via belega gesto kaj deziras al vi bonfarton kaj sukceson en via laboro. Kaj al via kara lando mi deziras pluajn sukcesojn. Mia plej granda deziro estus, se mi povos ĝisvivi ĝis

ankaŭ Taiwan estos reunuigita al via gloriĉa lando."

Antaŭ nelonge ni informiĝis el la ĉina ambasadorejo al Germanio, ke s-ro Karl Maier jam donacis ĉiujn siajn konservitajn librojn pri Ĉinio al la Ŝtata Biblioteko de Ĉinio en 1998. En sia testamento li difinis la ĉinan ambasadorejon kiel ĉefan heredanton de siaj posedaĵoj. Li plurfoje promesis donaci duonon de sia deponita mono al la Ĉina Esperanto-Ligo. Pasintjare, kiam ni vizitis lian hejmon, li ripetis tion. Li diris ankaŭ, ke oni foje proponis sendi lian malsanan edzinon al iu sanatorio per tiu sumo, sed li ne konsentis, ĉar li volis uzi la monon por Esperanto. Kia valorega donaco, en kiu ni povas vidi liajn koron, idealon kaj esperon.

Kiel jarcenta maljunulo s-ro Karl Maier travivis multajn eventojn kaj sociajn ŝanĝojn. Lia vivo mem estas historio kaj historio de Esperanto-movado. Li diris: "Oni lernas Esperanton, sed plej grave estas la fakto, kial oni lernas Esperanton. Mi lernas Esperanton por paco." Jes, por tiu nobla celo li laboradis la tutan vivon. Li meritas nian estimon kaj eternan memoron. ■

\* Prezidantino de la Ĉina E-Ligo kaj eksa vicĉefredaktoro de EPC

# Pri la dato de la naskiĝo de Esperanto

Ĉi tiu artikolo estas verkita de s-ro Dan Qisheng, kripla esperantisto de Sichuan-provinco, Ĉinio. Antaŭ 33 jaroj li paraliziĝis, sed li ne forlasis studon de Esperanto. Kiel konate, en 1987, kiam UEA festis la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, ĝi prenis la 26-an de julio kiel daton de la apero de la Unua Libro. La artikolo publikigita en iu mimeografita ĉina gazeto en aprilo 1987, prezentis la opinion de la aŭtoro pri la naskiĝdato de Esperanto.

## La Red.

de DAN QISHENG

**N**I scias, ke la aperdato de la Unua Libro de Esperanto en la rusa lingvo estas ankaŭ la naskiĝtago de Esperanto. Do, kiam aperis la Unua Libro? El niaj esperantistoj iuj opinias, ke ĝia aperdato estis la 14-a de julio 1887, kaj aliaj opinias, ke estas la 26-a de julio 1887. Sed, laŭ mia studado, ambaŭ datoj estas malĝustaj. La ĝusta aperdato devas esti la 21-a de julio 1887.

El letero de Zamenhof al N. Borovko, oni sciis, ke la “jaro” kaj la “monato” de la apero de la Unua Libro estas tute klaraj, ĉar en la letero Zamenhof informas, ke “fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887”. Tial ni bezonas studi efektive nur pri la “dato”, t.e.: En kioma tago?

La gravan fadenon de solvo pri la “dato” de la aperdato de la Unua Libro oni unue povas trovi en letero de Zamenhof al s-ro Ino T. Holmes datita de la 20-a de julio 1909.

En ĝi Zamenhof informas, ke “la dato de la apero de la unua libro estis ĉirkaŭ la 21-a de julio...”

Laŭ ĉi tiu grava fadeno ni povas plu trovi en la parolado de Zamenhof ĉe la inaŭguro de la Tria Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en la 12-a de aŭgusto 1907 en Cambrige, Britio, ke la ĝusta solvo pri la “dato” ja estas la 21-a de julio 1887. En la parolado Zamenhof informas, ke “antaŭ tri semajnoj finiĝis ĝuste dudek jaroj de la tago, kiam aperis publike la unua libro pri la lingvo Esperanto. En ĉiuj partoj de la mondo la esperantistoj festis tiun tagon. Kiel fondinto de Esperanto, mi ricevis en tiu tago multajn gratulajn telegramojn kaj leterojn. Ĉar mi ne havas kancelarion, sed mi devas mem ĉion plenumi en miaj liberaj horoj, tiel oni facile komprenos, ke respondi ĉiujn ricevitajn esprimojn de amikeco estis por mi afero absolute ne ebla, kaj oni min facile pardonos. Mi uzas nun la bonan okazon por esprimi mian plej sinceran dankon al ĉiuj, kiuj sendis al


mi amikajn bondezirojn.”

Por ĝuste solvi la problemon pri la “tago”, ni laŭ ĉi tiu parolado de Zamenhof la datojn (laŭbezone nur sume 29 tagojn) de antaŭ la inaŭguro el- kaj retro-kalkulu de la antaŭtago de la parolado de Zamenhof (t.e. de la 11-a de aŭgusto 1907) ĝis la 14-a de julio 1907 per jena skemo, kaj analizu tri “tagojn” el la el- kaj retro-kalkulitaj datoj. (Legu la skemon sube.)

La skemo montras, ke oni retrokalkulu de la dato, la 11-a de aŭgusto 1907, ĝis la dato, la 22-a de julio 1907, sume tri semajnoj (dudek unu tagoj), kaj la unua tago de “antaŭ tri semajnoj”, aludita de Zamenhof estas ĝuste la 21-a de julio 1907. Tial, Zamenhof ricevis en la 21-a de julio 1907 la gratulajn telegramojn kaj leterojn. En ĉiuj partoj de la mondo la esperantistoj festis en la 21-a de julio 1907 la 20-an naskiĝan datrevenon de Esperanto. Sendube, en la 21-a de julio 1907 finiĝis ĝuste dudek jaroj de la tago, kiam aperis publike la Unua Libro.

La skemo montras plu, ke la dato, la 14-a de julio, ja estas malĝusta pro tio, ke ĝi ricevis retrokalkule la tagon 29, kaj ĝi troviĝis ĉe la unua tago de antaŭ kvar semajnoj, ne ĉe la “tago” de “antaŭ tri semajnoj”, aludita de Zamenhof; same, la dato, la 26-a de julio, ja estas ankaŭ malĝusta pro tio, ke ĝi ricevis retrokalkule la tagon 17, kaj ĝi troviĝis ĉe la tria tago de antaŭ du semajnoj, ne ĉe la “tago” de “antaŭ tri semajnoj”, aludita de Zamenhof.

Tial laŭ ĉi tiu parolado de Zamenhof ni povas tre facile retrokalkuli, ke la ĝusta aperdato de la Unua Libro, t.e. la dato de la naskiĝo de Esperanto ja estas la 21-a de julio 1887. ■





# Nia prelega vojaĝo en Eŭropo

En 3 monatoj ni vizitis entute 47 urbojn kaj regionojn, 57 E-societojn kaj aliajn organizojn, tranoktis en 60 hejmoj kaj hoteloj.

---

de SHEN CHENGRU kaj  
WANG YUCHUN

---

**N**IA vojaĝo en Francio, Germanio kaj Svisio estis gaja, emocia kaj plena de amikeco. Ni spertis la fakton, ke Esperanto ne konas landlimon.

Nia vojaĝo daŭris preskaŭ 3 monatojn de la 1-a de aprilo ĝis la 28-a de junio ĉi-jare. Ni vizitis entute 47 urbojn kaj regionojn, 57 E-societojn kaj aliajn

organizojn, tranoktis en 60 hejmoj kaj hoteloj kaj 65-foje faris prelegon kaj demonstradon. Ĉirkaŭ en ĉiu tria tago ni ŝanĝis lokon. Iafoje, tuj elvagoniĝinte, ni direktis nin al kunvenejo ne havante tempon mendi hotel-ĉambron. Aliffoje ni devis fari plurajn prelegojn en unu tago. Ni ambaŭ estis ĉ. 70-jaraj. Niaj eksterlandaj samideanoj admiris nian energion por tiel streĉa laboro. Ankaŭ ni mem miris pri nia laboro, eble nin kaptis la subkonscio dividi niajn spertojn

en tiuj 70 jaroj kun alilandaj samideanoj.

Ni devas atribui nian sukceson en la turneo al franca esperantistino Marie-France Conde Rey. Dank' al ŝia helpo ni sukcese kontaktis 40 francajn Esperantajn organizojn kaj klubojn. Laŭ peto de diversaj lokoj ŝi faris detalan planon por nia vojaĝo, kopiis kaj disdonis la tekston de nia prelego, kaj krome, ŝi helpis nin aĉeti biletojn por trajn-veturado en Francio, tiel ke nia vojaĝo estis senproblema.



En nedeviga ĉin-lingva kurso de mezlernejo en Sankta Briec

## POPULARIGI SCIOJN PRI ĈINIO

Nia vojaĝo komenciĝis duonjaron post la 50-jara jubileo de nia respubliko. Multe da homoj deziris koni Ĉinion.

Laŭ propono de tri-landaj esperantistoj ni prelegis ĉefe pri kontribuoj de la ĉina tradicia kulturo al la homa civilizacio, studo pri la rilato inter cerba scienco kaj inteligenteca disvolviĝo, la scienc-teknika progreso de la nova Ĉinio, ĝia ekonomia disvolviĝo kaj granda ŝanĝiĝo de la vivo de ĝia popolo en la pasintaj 50 jaroj, sanprotektado de antikvaj ĉinoj, kaligrafio kaj pikturo de ĉina stilo. Ifoje ni kantis aŭ prezentis memsanigajn metodojn. Multaj montris ŝaton al la tradicia ĉina kulturo. En Normandio de Francio ni renkontis veteranan esperantiston, kiu havas francan version de la klasika ĉina verko "Yi Jing" kaj verkojn de antikvaj ĉinaj poetoj.

Preskaŭ ĉiujfoje post nia prelego iuj iris sur la podion por rigardi nian ekspozicion sur muro, aliaj petis de ni pentraĵojn kaj kaligrafiaĵojn kiel memoraĵojn kaj triaj faris skribaĵon sur nia kajero. S-ino Jossette Ducloyer de Quimper en la nomo de sia tuta familio skribis: "Dank' al vi, karaj ĉinaj geamikoj, ni konas pli multe pri Ĉinio, kaj la tuta urbo pri Esperanto. La tutan vivon ni memoros pri nia komuna amikeco."

En la kontakto ni vidis, ke en Eŭropo multaj deziras koni Ĉinion kaj studi ĝin. Inter ili kompreneble estas legantoj de "El Popola Ĉinio" kaj aŭskultantoj de Ĉina Radio Internacia. En Francio kaj Germanio estas multaj gejunuloj, kiuj lernas la ĉinan lingvon. Tie troviĝas multaj homoj, kiuj ŝatas la ĉinan medicinon, ĉinajn medikamentojn, akupunkturon kaj mokson, *tajĝiĉjŭan* kaj *ĉigong*, ĉinan teon kaj ĉinajn manĝaĵojn.



Kun e-istoj de Tours

## FERVORAJ ESPERANTISTOJ

Ĉie, kie ni estis, ni sentis la ekziston de nia lingvo Esperanto. Gvidantoj de lokaj E-organizoj, emeritoj, veteranaj esperantistoj kaj multaj aliaj senegoisme laboris por nia lingvo. Nian prelegon aŭskultis urbestroj kaj parlamentanoj de 7 urboj, kaj ĝin raportis ĵurnaloj de 14 urboj.

Ĉie, kie ni estis, laboras energiaj kaj amikaj Esperanto-organizoj. Dank' al ilia helpo nia prelego povis atingi sian sukceson. Inter ili estis Dennis Serge Clopeau, Jacques Joquin, Jacques Ravary kaj Claude Gacond, kiuj nin veturigis kaj akompanis nin en la vizito. Manjo Clopeau kaj Jossette Ducloyer ofte akompanis nin al bazono, librejo kaj lernejoj. Louise Rigault kaj Gabi Treanton instruas Esperanton jam de sia juneco kaj neniam pagigis la lernantojn. Laura Viellefond estas jam 80-jara, tamen ankoraŭ penas por baki junajn esperantistojn. Isabelle Martinez kaj Gisele Gizard sekvis nin al pluraj urboj por aŭskulti nian prelegon. Ankaŭ la Esperanto-avo Leo Robert kaj svisa erudiciulo Giorgio Silber

multe helpis nin.

En la Esperantujo ofte okazis hazardaj renkontiĝoj kaj kortuŝaj interparoloj, kiujn ĉiujn ni ne povas mencii pro limigo de la paĝo.

Niaj prelegoj en turneo atingis grandan sukceson. Ni vere spertis la kapablon de nia lingvo en



Plantado de arbo Paco en Eysines

scienc-teknika kaj kultura interŝanĝoj kaj popola kontakto. Ni spertis la intiman amikecon de diverslandaj esperantistoj, kies bazo estas nia komuna lingvo Esperanto. ■

# Esperanto, Ĉinio kaj mi... triangula amrilato



La aŭtoro (meze)

de RAYMOND WYLLEMAN  
(Belgio)

**E**N 1945, je la fino de la Dua Mondmilito, mi unuafoje aŭdis pri la internacia lingvo Esperanto. Dum la okupadaj jaroj ĝi estis malpermesita. Kiel ĉiuj diktatoroj, nazi-Hitler ne toleris ĝin. Post la milito, en la porinstruista lernejo, nia profesoro pri lingvoj manifestiĝis kiel bonega parolanto de Esperanto, kiu tiam iĝis esperiga rimedo por estonta daŭra paco. Mi memoras ke mia patro rakontis ke post la Unua Mondmilito (1914-1918) la pacamantoj prenis kiel simbolon “la rompitan fusilon”. En 1945 Esperanto estis nova pacsimbolo: per ĝi la homoj pli bone komprenus unu la alian kaj pli bona interkompreno estus bazo por “neniam plu milito”.

Tiuj vortoj entuziasmigis multajn el miaj samklasanoj. Ni eklernis Esperanton, starigis lernejan grupon, ekkorespondadis, eĉ kun Aŭstralio...

Post la diplomiĝo en 1947 mi ŝajne estis la nura persistulo de nia klaso, precipe ĉar mi havis la ŝancon ke en mia urbo estis Esperanto-grupo, kiu organizis kursojn.

Kaj la vivo daŭris... Materialaj problemoj sin prezentis: Trovi instruistan postenon, enspezi monon por iome repagi al la gepatroj la studkostojn. Ni ja estis ses infanoj hejme kaj nur la patro estis la vivgajnanto dum la malfacilaj militjaroj. En 1948 mi ekkonis ĉarmulinon kaj post du jaroj ni geedziĝis kaj transloĝiĝis al urbeto, kie neniu antaŭe jam aŭdis pri tiu internacia lingvo. Infanoj naskiĝis,

grandiĝis, materialaj problemoj pliiĝis... Esperanto ŝoviĝis funden...

En 1983 mi pensiĝis.

En franclingva televida programo mi hazarde sekvis intervjuon kun la eŭrazia verkistino Han Suyin, filino de belga patrino kaj ĉina patro. Mi konstatis ke mi ege malmulte sciis pri Ĉinio kaj mi eklegis ĉiujn librojn de Han Suyin, kiujn mi trovis en biblioteko kaj librovendejo. Mi ekkaptiĝis... kaj eklernis la ĉinan lingvon en kurso organizita de junaj ĉinologoj en la universitata urbo Gent. Malfeliĉe la duan studjaron mi ne povis sekvi pro aŭto-akcidento.

Ĉinio tamen daŭre okupis miajn pensojn kaj sekvante subitan impulson mi aĉetis Esperanto-lernolibron kaj... post ses monatoj mi jam havis ĉinan korespondanton. (Ding Shihui, instruisto pri la angla lingvo, el Changde, Hunan. Kie vi estas nun? Kiel fartas via familio? Ĉu via adreso ankoraŭ estas la sama kiel en la komenco de la naŭdekaj jaroj? Kara samideano, se vi legas ĉi tiun tekston, bonvolu kontakti min. Mia adreso ne ŝanĝiĝis. La kaligrafajo, kiun vi faris por mi, havas honoran lokon en mia laborĉambro.)

Tiel fariĝis mia unua rekta kontakto kun Ĉinio: per Esperanto!

Mi intertempe aniĝis al la Asocio Belgio-Ĉinio, kies celo estas plifortigi la amikajn rilatojn inter ambaŭ landoj. Por finance realigi mian intencon vojaĝi al Ĉinio, mi serĉis kromlaboron kaj en 1984 mi kaj la edzino transloĝiĝis al la provinco Hainaut por funkcii kiel ĉiĉeronoj en 18-jarcenta kastelo. La franclingva belga provinco Hainaut estas ĝemeligita kun la

ĉina provinco Hunan, kaj en oktobro 1986 estis organizita amikeca vojaĝo al Ĉinio, kun unusemajna restado en Changsha. La du aliajn semajnojn de nia restado en Ĉinio ni vizitis i.a. Pekinon, Guilin kaj Kantonon. Mi iam legis, ke “Tiu, kiu vizitis Ĉinion dum unu semajno, reveninte hejmen verkas gazetaran artikolon, kaj tiu, kiu vizitis Ĉinion dum unu monato, verkas libron.” Mi, tamen plenplena de impresoj, ne verkis ion, sed montris miajn multajn lumbildojn ĉe pluraj esperantistaj grupoj kaj aliaj kulturaj asocioj. Kion vi volas? “Tion, kio la koron plenigas, la buŝo elverŝigas.”

Por la “40 jaroj de EPC” mi verkis tekston por la konkurso kaj, neatendite, ricevis la duan premion, kaligrafajon de Chen Xiwei por la poemo “Bambuo sur Roko” de la fama poeto Zheng Banqiao (1693-1725):

*Ĝi montajn ŝtonojn firme  
kaptas per la radikdentoj,  
tra ĉiuj penetreblaj vojoj de  
la rokaj fendoj.  
Post dekmil frotoj, dekmil  
frapoj restas ĝi fortika,  
kaj vane provas ĝin ataki  
ĉiudirektaj ventoj.*

En 1992, mi, kun belga grupeto, partoprenis en la Pacifika Kongreso en Qingdao. Gesamideanoj ĉinaj organizis nian vojaĝon de Pekino al Qingdao kaj Wang Shirong de EPC akompanis nin. Grandega travivaĝo! Aparte la vizito de la naskiĝurbo de Konfuceo kaj lia arbara tombejo frapis min. Dumvoje ni renkontiĝis kun lokaj geesperantistoj kaj ĉie ni spertis la saman senton de amikeco, kiu varmigis al ni la



# EPĈ-leganto de 42 jaroj en Vjetnamio

de DANG DINH DAM  
(Vjetnamio)

**L**A vivarbo de Esperanto de L.L. Zamenhof kreskas tiel forta kaj abunda en sia 113-jara aĝo kun centoj da belaj floroj, el kiuj la plej bela estas "El Popola Ĉinio".

Tiun belan kaj parfuman floran mi havis bonŝancon ĝui ekde mia lernado de Esperanto en Hanojo en 1958. Mi povas diri ke EPĈ estas la unua E-revuo, kiun mi legis kun intereso kaj pasio, ĉar ĝi estas ne nur belaspekta, sed ankaŭ enhavoriĉa. Kion mi povas skribi pri tiu revuo, kiu estas mia ĉekusena legaĵo de 42 jaroj?

Antaŭ ĉio mi esprimas mian sinceran dankon al la redakcio, kiu kun la Zamenhofa spirito ĉiam helpis sian najbaran fratetan E-movadon en Vjetnamio, sendis ĉiumonate al Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) 50 ekzemplerojn de ĝia ŝatata revuo.

Se Esperanto estas tre valora por mia vivo, do EPĈ estas orlibro por mia E-progreso. Ĝi estas mia bona akompananto de kiam mi eklernis Esperanton en 1958. Esperanto malfermis al mi la vojon verdan, pontas al mi amikecan rilaton kun diversaj E-organizoj kaj geamikoj.

En 1964, mi enoficiĝis kiel kadro de VPEA. Mi havis okazon ofte legi EPĈ kaj aliajn E-revuojn, kiel Heroldo de Esperanto, Bulgara Esperantisto, Hungara Vivo kaj Esperanto. Esperanto fariĝis laborilo

profesia por mi. La situacio ŝanĝiĝis, multaj el ili malaperis, do la Jubileo de 50-jara eldono de EPĈ des pli valoras, tio estas ne nur glora por la ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ fiera por la tutmonda esperantistaro.

Fama ĉina antikva poeto Du Fu iam diris: "Leginte dekmil librojn, oni faras verkadon kvazaŭ helpite de ĝenio." En Vjetnamio estas simila diro pri verkisto Nguyen Du: "Inko volas danci, kaj plumo volas flugi." Do leginte tiom da EPĈ, mi volas, ke mia inko kaj plumo flugu al vi por danki, por admiri, por esperi kaj kunĝui en tiu glora datreveno.

Estas interese, ke kiel leganto de EPĈ, mi fariĝas ĝia kunlaboranto, fariĝas unu el la intimaj amikoj de la ĉinaj esperantistoj.

En 1965, kiel kadro de VPEA, mi havis okazon renkontiĝi kun la unua ĉina esperantisto, verkisto Bakin, kiu vizitis nian E-Klubon en Hanojo. Mi konservas lian foton kaj aŭtografon.

En 1975, kiel organizinto mi akceptis la tripersonan delegacion de ĈEL, ĉekape de ĝia prezidanto Chen Yuan.

En 1983, ĉe la 68-a UK en Budapeŝto, en 1987, ĉe la 72-a UK en Varsovio, kaj precipe en 1994, ĉe la 79-a UK en Seulo, mi havis okazajn konatiĝi kun iama ĝenerala sekretario de ĈEL, s-ano Dai Song'en kaj li mem ennome de ĈEL sendis senpage al ni

ĉiumonate 15 ekz. de EPĈ, kaj li mem ĉiam volus akcepti min, se mi havis okazon viziti Ĉinion. Ĉio ĉi ankoraŭfoje montras la tradician amikecon inter la ĉina kaj vjetnama esperantistaroj. Pro tio kiam mi estis informita pri lia forpaso, mi estis tre ĉagrenita, tiel ke mi tuj verkis kondolencan akrostikon al li:

*D-e "Esperanto" februara kun  
dolora informo*

*A-miko ĉina mondkonata jam  
forpasis*

*I-ntima profesia lerta  
esperantisto*

*S-en iu ajn parolo testamentis  
O-ni memoras lin — la unua*

*parolist'*

*N-eniam forgesos lin — UEA-  
ĉefdelegit'*

*G-aja ĝenerala sekretario de  
Ĉina E-Ligo*

*E-n Pekino li iris for — en  
eterno!*

*N-i al li kore kondolencas —  
nome esperantist'!*

EPĈ ankoraŭ alportis al mi  
bonan kuraĝigon pri mia verkado.  
Ĝis nun ĝi  
jam



La aŭtoro (maldekstre)

publikigis miajn poemojn pri Armand Su, pri E-agado en Vjetnamio kaj pri mia E-vivo mem. ■

koron. Ne, ne eblas transdoni tian sperton al neesperantisto. Oni mem travivu ĝin.

Nu, kara leganto, ĉu vi jam malkovris tion, kio estas je la bazo

de miaj rilatoj kun Esperanto unuflanke kaj Ĉinio aliflanke? Jes, la homaj kontaktoj. En tiu strebado celanta Ĉinion kaj ĝiajn enloĝantojn la monata revuo "El Popola Ĉinio"

estas grava kaj samtempe belega instigilo kaj mi esperas al ĝi kaj ĝia redaktistaro ankoraŭ multajn jarojn. Mi aŭdace diras: "Ĝis 2010, por viaj 60 jaroj!" ■

# Tago de Josef

“Efektive, en la mondo la plej sincera, bela kaj emocia estas muziko, kiu neniam trompas vin. La muziko, ekstrema perfektaĵo de la skriba lingvo, sentigas al vi kaj via sento spegulas vian koron. La valoraĵo, kiun homoj postlasis al la homaro, estas neniu alia ol la muziko.”

de CHANG YAN\*

**K**IEL Josef\*\* pasigis sian tagon?

Pri tio estas malfacile respondi. La tagoj, en kiuj li komponas muzikaĵon, ŝajne estas longigitaj kelkoble kaj en liaj grandaj okuloj ne plu brilas infana naiveco, kvazaŭ li subite grandiĝus kaj maturiĝus. Tra liaj nebulaj kaj foraj rigardoj vi povas rimarki lian personan universon, kiu apartenas nur al li mem — muziko.

Kiam li komponis la duan koncerton de gitaro kaj perkutinstrumentoj por la Simfonia Orkestro de Gothenburg, li, kun plena energio, verkis senhalte. La muzikistoj, kiuj helpis lin en kopiado de muzikaj notacioj, komence akompanis lin sendorme dum lia verkado, sed poste pro neeltenebla dormemo ili alterne iris ripozi por povi alterne servi al li. Kiam li finis sian verkadon, oni diris al li, ke li jam laboradis kontinue sep tagnoktojn, nur tiam li ekkonsciis la tempopason.

Josef diris: “Nur post kiam oni sin liberigis el la reala mondo kaj fandiĝis kun muziko, oni povas en svena stato vere koni la magneton de la muzika origino kaj aŭdi la de vi sopiratan sonon el malproksimo...” Fakte, Josef tiamaniere aŭdis muzikon ne sole en svena stato.

Kiam mi parolas al li, ĝenerale li ne respondas, sed larĝe malfermas siajn grandajn okulojn kun eterna rideto sur la vizaĝo, tio povas daŭri longan tempon, dume vi eĉ povas fari ion aŭ alion ekstere kaj jam forgesas kion

vi diris, tiam aŭdiĝas lia voĉo: “Pardonon, kion vi diris?”

Oni intervjuis Josef kaj publikigis artikolojn pri li en malsamaj lingvoj, sed plejparte pri liaj muzikaj kariero kaj sukcesoj. Iu artikolo havas jenan titolon: “Homo duonreala”. Mi surpriziĝis kaj admiris la kapablon de la intervjuinto pro tio, ke li povis fari tiun titolon en resumo post mallonga intervjuo.

Kiam amikoj telefonis al mi, ni ofte ŝercis:

“Yan, ĉu Josef estas hejme?”

“Ĉu lia korpo aŭ lia animo?”

“Kia diferenco estas en tio?”

“Lia korpo estas, sed lia animo, neniu scias, kie ĝi vagas.”

“Ho, Dio la mia!”


Josef malmulte dormas, precipe post kiam li ĝuis koncerton aŭ bonan muzikaĵon, li ĉiam brulas de ekscito sen dormemo. Do, tiam ni havas rendezuon kun amikoj en malgranda drinkejo de la 17-a aŭ 18-a jarcento centre de Venecio kaj babilas ĝis tagiĝo.

Ofte, mi vekigis de mildaj kisoj de Josef en frua mateno. Kiam mi malfermis la okulojn ankoraŭ dormemajn, Josef, kliniĝante super mi, rigardas min kaj konigas al mi unue sian novan malkovron el la muzikaj veraĵoj. Kelkfoje li diris al mi:

“Mi ĵus ĝuis tre tre apartan melodion.

Efektive, en la mondo la plej sincera, bela kaj emocia estas muziko, kiu neniam trompas vin. La muziko, ekstrema perfektaĵo de la skriba lingvo, sentigas al vi kaj via sento spegulas vian koron. La valoraĵo, kiun homoj postlasis al la homaro, estas neniu alia ol la muziko. Ekz., kvankam la karno de Wolfgang Amadeus Mozart kaj Ludwig van Beethoven jam malaperis, sed ilia muziko ŝvebas ankoraŭ en la aero, inter steloj, sur la luno...

Kun miro mi rigardis Josef, bone sciante, ke nur post kiam li eniris en sian propran muzikan



Josef Fung



La aŭtoro kaj ŝia edzo Josef

universon, li povas diri ĉion tion kiel filozofo. Ordinare li estas kvietita. Mi diris, ke li kun rideto rigardas la mondon.

Josef naskiĝis en Hongkong kaj lernis en privata elementa lernejo funkciigita de itala episkopo. En la lernejo oni donis ĉiujn lecionojn angle kaj malmulte pri Ĉinio, kiu estis iluzia kaj mistera por la juna Josef.

Komence de la 70-aj jaroj de la 20-a jc. dekkelk-jara Josef sole vojaĝis al Britio por lernado. Antaŭ tio liaj lernopojtoj de fiziko estis ĉiam bonaj kaj li adoris Albert Einstein. Tamen en Britio Josef konsciis, ke tiu, kun kiu li estas nedisigebla kaj kiun li rigardas kiel vivo, ne estas fiziko, sed muziko.

La gitaro, kiun li aĉetis per la mono destinita por lia 12-jariĝo kaj la disko de John Williams, majstro de gitaro, komplete ŝanĝis la vivon de Josef. De tiam la muziko kiel giganta bunta aŭreolo kovris Josef, ke li ne plu eliris el tiu muzika universo plena de ĉarmaj allogoj...

Josef decidis finlerni en unu jaro la muzikajn teoriojn instruitajn en universitato dum pluraj jaroj kaj post tio sin anonci al la Reĝa Norda Muzika Kolegio de Britio kun la plej bona gitara fakultato. Por tio li verŝis grandegan diligentecon, kaj unu jaron poste li akiris la unuan lokon en ekzameno kaj sukcese eniris en la kolegion. Kaj majstro de gitaro John Williams, kiun li adoras de

infaneco, gvidis lin kiel profesoro.

Diplomiĝinte el la kolegio, Josef instruis, verkis kaj prezentis en Islando, Nederlando, Aŭstrio, Norvegio kaj Svedio. Islanda muzika lernejo liveris al li 5-monatan ferion salajritan. Dank' al tio Josef havis pli da ŝancoj libere viziti la mondon kaj vagi en la muzika universo.

En 1987 Josef venis en Ĉinion laŭ invito de la Ĉina Kultura Ministerio. La torentaj homfluo sur pekinaj stratoj ege surprizis lin kaj liajn kolegojn. En la sekvanta mateno post kiam ili atingis Pekinon, Josef kaj aliaj tri muzikistoj el Islando kaj Svedio eliris el la hotelo Qianmen, en kiu ili loĝis, por spekti la homfluojn sur strato. Ili, starante sub semaforo kaj ĉiu al unu direkto malsama, kun plezuro ĝuis tiun stratan spektaklon de mateno ĝis tagmezo. Josef diris, ke ili, kaptitaj de la sceno sur strato, ne volis provludi tiun tagon.

“Ho, nekredible! Biciklantoj torentis antaŭ ni kaj ni povas aŭdi ankaŭ plaŭdadon de ondoj.” Tion rememorante, Josef ankoraŭ emociiĝis kvazaŭ li rigardus altajn ondojn ĉe Ora Marbordo.

Dum la turneo en Ĉinio la intereso pri tiu lando grandiĝis pli kaj pli ĉe Josef, kiu kunportis aron da sonbendoj kaj diskoj al Eŭropo. Poste li ne nur verkis artikolojn pri Ĉinio kaj ilin publikigis en ĵurnaloj de norda Eŭropo, sed ankaŭ multe legis pri ĉinaj historio, kulturo kaj muziko.

Komence de la 90-aj jaroj de la 20-a jc. Josef refoje vizitis Ĉinion kaj okazigis koncerton de gitar-solludo. Antaŭ la vojaĝo mi multe aĉetis donacojn por miaj ĉinaj parencoj kaj amikoj kaj Josef ne komprenis: “Estas tro frue prepari donacojn por Kristnasko. Mi preferas donaci al ili muzikon ol objektojn, kiuj malaperos iun tagon, sed muziko restos por ĉiam en Ĉinio.” Mi kapjesis, sed ne ĉesis meti ilin en la valizon. Tion vid-

inte, Josef hastis envalizigi sian muzikon.

Josef longe vivas en norda Eŭropo kaj amas la naturon. La afableco kaj honesteco de nord-eŭropanoj, kvieteco de la primitiva arbaro en Aŭstrio, imponeco kaj majesteco de la grandaj montaroj kaj glaciriveroj en Islando kaj Norvegio multe inspiras Josef kaj liveras al li vastan kaj liberan spacon por komponado.

En la vivo de Josef ne ekzistas ombro kaj li neniam ĉagreniĝis. Ŝajnas, ke li ĉiam vivas en sunlumo. Amikoj diris: “Por Josef ĉiuj homoj estas anĝeloj.” Li larmis, sed nur pro muzika emocio.

Post rigardo de filmo, Josef forlasis la kinejon ĉiam la lasta. Kvankam la epiloga muziko jam finiĝis, li ankoraŭ staris antaŭ ekrano kun la kapo alte tenata por legi nomon de la komponisto, ludisto, orkestro, kaj eĉ tiun de produktinto. Komence mi ofte urĝis lin forlasi la kinejon, poste mi komprenis lin kaj ne plu tiel faris.

Vespere, kiam Josef estas libera, li ĉiam gvidas min kaj nian hundeton Schatzi ĝui la subirantan sunon, vizaĝe al kiu Josef ofte svingas siajn longajn brakojn kvazaŭ gvidi grandan simfonian orkestron. Tiu orkestro ludas simfonion de amikeco, sincereco kaj reciproka respekto. Ĝi ŝvebas en la naturo kaj kosmo, kaj tiam en la tuta mondo regas harmonia eĥo.

Probable tio estas unu tago el la muzika vivo de Josef. ■

---

\* Chang Yan, verkistino kaj edzino de Josef Fung

\*\* Josef Fung, mondfama moderna gitar-ludisto kaj komponisto, estas la unua alilanda premiito de la Kunveno de Komponistoj pri Internacia Kunlaboro de Verkado de la Usona Ford-Fondaĵo en 1997, prezidanto de la 25-a Internacia Komputora Muzika Festivalo en 1999 kaj verkis muzikaĵon “Verdaj Olimpikoj”.



# Ludo de kuraĝuloj



La platformo alta je 55 metroj



Geamantoj kune malsupren

---

Teksto de ZI YUAN


Fotoj de ZHAI DONGFENG

---


En 1997 fondiĝis la unua ĉina centro de *Bungy*-ludo en Fangshan-distrikto, Pekino. La centro estas ĉirkaŭita de kontinuaj montoj.

*Bungy*-ludo estas sporto tre ŝatata kaj ekscita. Kiam vi bone preparas vin kaj saltas de sur alta platformo en rapideco de 9.8 m/sek., vento siblas ĉe viaj oreloj kaj vi eĉ sentas vin neekzistanta. Kiam vi proksimiĝas al la surfaco de akvo, kaŭĉuka ŝnuro abrupte streĉiĝas kaj alten levas vin kaj vi sentas vin ankoraŭ viva. Estas freŝe, terure kaj ekscite sperti plurajn tiajn malsuprensaltajn kaj leviĝojn.

Ĉiu sukcesinto povas akiri "ateston de kuraĝulo". Li estas heroo. Eble li diras: "Estas bone, ke mi vivas."



Survoje al *Bungy-ludejo*



Pendanta en la aero

# Grava anonco

Karaj samideanoj,

Kutime en oktobro, kiam niaj legantoj ricevis "El Popola Ĉinio", ili kune ricevis ankaŭ ĝian abonilon por la sekvanta jaro, sed ĉi-jare la abonilon ni ne sendis. Eble ili miras pri tio. Jes, grava ŝanĝiĝo okazas al nia revuo. Ĉi tie ni informas niajn karajn legantojn, ke ekde la jaro 2001 ni ĉesos presi la revuon, sed daŭrigos la eldonadon rete. Pro tio ni ne plu abonigos la revuon.

"El Popola Ĉinio" kun historio de 50 jaroj havas multajn fidindajn legantojn kaj amikojn. Nun, kiam ni publikigas la informon, ni sentas grandan bedaŭron. Ĉi-momente ni petas komprenon de niaj legantoj, perantoj kaj ĉiuj, kiuj subtenis nin, kaj kore dankas ilin pro ilia amikeco kaj kunlaboro en la pasintaj jaroj.

Ni redonos ĉiujn abonpagojn por la venontaj jaroj. Se iuj deziras aĉeti per tiu monsumo librojn eldonitajn de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, ni plenumos ilian deziron kiel eble plej rapide kaj ĝuigos al ili rabaton. Se niaj legantoj havas aliajn dezirojn aŭ sugestojn ĉi-flanke, ni laŭeble kontentigos ilin. Ni atendas ilian baldaŭan respondon pri tio, kiun manieron pri la redono de abonpago ili preferas.

De longa tempo nia revuo ĝuas grandan ŝaton de niaj legantoj novaj kaj malnovaj.

Pro tio ni sentas ĝojon, ĉar tio kuraĝigas nin por nia laboro. Sed en la lastaj jaroj ni renkontis multajn malfacilojn kaj la ĉefaj estis manko de monrimedoj kaj konstanta malpliigo de la abonantoj. Ni esperas, ke la ĉesigo de preso de "El Popola Ĉinio" ne kaŭzos miskomprenon pri nia sinteno al Esperanto. Kiaj ajn malfaciloj estas kaj estos, ni restos ĉiam fidelaj al ĝia idealo. Ni ŝanĝos nur la eldonan manieron de la revuo, sed la celo uzi kaj disvastigi Esperanton restos sama kiel antaŭe. Kun granda fido ni bone daŭrigos la eldonadon de "El Popola Ĉinio" rete. Ni kredas, ke la homa mondo, kiu eniris en la epokon de reto, donos al nia lingvo kampon disvolviĝi kaj la reta "El Popola Ĉinio" fariĝos nova fenestro enrigardi en Ĉinion. Krome ni havas ankaŭ la ĉinan-Esperantan revuon "La Mondo", eldonatan de la Ĉina Esperanto-Ligo por konigi la ĉinan Esperanto-movadon, studi lingvajn problemojn kaj raportoj pri aktivuloj de la ĉina E-movado. Post rearanĝo ĝi eble fariĝos nova ligilo inter ni kaj alilandaj samideanoj. Unuvorte, ni senŝanĝe uzos nian lingvon por amikeco, homa progreso kaj mondpaco.

Ekde nun la nova "El Popola Ĉinio" estas legebla per la retejo: [www.china.org.cn](http://www.china.org.cn)

La Red.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

★ Mi deziras interŝanĝi telefonkartojn tm., kaj invitas samideanon por resti ĉe mia domo dum unu aŭ du monatoj senpage. Interesiĝantoj bonvolu leteri al Basilio P. Pinto, Av R Formoso 79, BR 77470-000 Formoso Do Araguaia-to, Brazilo.

★ Tan Huiming, arkivisto kun hobio pri literaturo kaj traduko, dez. kor. kun germano, aŭstriano, polo, hungaro kaj aliaj. Adr.: Zhuzhou Suliaochang, Qingshuitang, 412004 Zhuzhou, Hunan, Ĉinio.

★ S-ro Fulvio Scarpa dez. kor. kun skarpanto pri diversaj temoj. Adr.: Fondo Versace, 3 Tr. n. 24, 89126 Reggio Calabria, Italio.

★ S-ino, 34-j., dez. kor. kun amikoj el Eŭropo kaj Aŭstralio, interesiĝas pri Esperanto kaj literaturo. Adreso: p/a Yan Ling, Guangzhoushi Jiaoyi Guangchang 2308 Shi, Dongfeng Zhonglu 268 Hao, 510030 Guangzhou, Guangdong, Ĉinio.

★ Vizitu internacian vendejon je la adreso: [www.N21ECOM.COM/EU-CZ-osobne](http://www.N21ECOM.COM/EU-CZ-osobne) ĉislo: 385 223

★ Mohd. Nawaz kaj Ali. Dar dez. kor. tm. Adr.: Kashmir General Store, Street 3, Qadeerabad, PK-60000, Multan. Pakistano.

★ S-ino Dinara Haziyaeva, 18-j., dez. kor. tm. pri historio, urboj, muzikoj kaj ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Adr.: P.O.Kesto 11623, u. Taŝkento 700085, Uzbekistano.





# Revenis hejmen elafuroj

- Li hazarde rigardis internen de la imperiestra ĝardeno kaj miris: tie estas amaso da strangaj bestoj. Li ne komprenis, kial tiaj bestoj vivas ekskluzive en la imperiestra ĝardeno.
- La elafuroj estis simbolo de la ĉina imperiestreco, kaj ĝuste pro tio, ili ankoraŭ povis vivi en la imperiestra ĝardeno, kiam la aliaj pereis.

Teksto de GUO GENG kaj  
PANG BIAN  
Fotoj de LIU SIGONG

**L**A elafuroj (*Elaphurus Davidianus*) vivis ekskluzive en Ĉinio. Ili havas kapon similan al tiu de ĉevalo, voston similan al tiu de azeno, hufojn similajn al tiuj de bovo kaj kornojn similajn al tiuj de cervo. Post la naskiĝo de antikvaj ĉinaj ideogramoj, la skribaĵo kun la signifo de elafuro estis gravurita sur testuda ŝelo kaj besta ostoj. Poste elafuroj vivis sole en imperiestraj ĝardenoj longajn jarojn, sed en 1900 ili malaperis komplete sur la ĉina teritorio. Hodiaŭ, kiam ni vizitas la antaŭajn imperiestrajn ĝardenojn, ni povas denove vidi ilin.

## LEGENDA SORTO

En la naturo la elafuroj evoluis 2 milionojn da jaroj, tamen ilin ekkonis la biologoj malfrue. En iu aŭtuna tago de 1865 franca muzeologo kaj

misiisto Pere Armand David esploris bestojn kaj vegetalojn en la suda antaŭurbo de Pekino. Li hazarde rigardis internen de la imperiestra ĝardeno kaj miris: tie estas amaso da strangaj bestoj. Li ne komprenis, kial tiaj bestoj vivas ekskluzive en la imperiestra ĝardeno.

Li ne sciis, ke la elafuroj estis simbolo de la ĉina imperiestreco, kaj ĝuste pro tio, ili ankoraŭ povis vivi en la imperiestra ĝardeno, kiam la aliaj pereis.

La elafuroj vivis en marĉoj en la basenoj de Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero. Ili, herbovoraj, havas grandan vivipovon. La fortaj, belegaj kornoj de la virelafuroj falas vintre kaj rekreskas printempe kaj tio kongruas kun la sezona alterno. Antikvuloj supozis, ke tio estas la volo de la ĉielo, kaj rigardis ilin bonaŭguraj bestoj. La suverenaj opiniis, ke ankaŭ ilia suvereneco, kiel la elafuraj kornoj, estis donita de la ĉielo, kaj deziris, ke ilia imperiestreco daŭru senfine kiel la elafuraj

kornoj, tial ĉiujare en la tagoj, kiam estis rekreskantaj la elafuraj kornoj, la imperiestroj eliris el sia palaco por rigardi kreskadon de novaj kornoj. Reĝo Wen de Zhou-dinastio (11-a jc. a.K.) konstruis ĝardenon ĉe rivero por teni elafurojn kaj trumpetis, ke li ricevas la suverenecon de la ĉielo. Reĝo Xuan de Qi-regno (319 a.K. — 301 a.K. sur trono) publikigis leĝon “mortigi elafuron egalas al hommortigo” kaj de tiam en la imperiestraj ĝardenoj bredado de elafuroj herediĝis de generacio al generacio. Malgraŭ ĉio ĉi tio sovaĝaj elafuroj komplete malaperis en Ming-dinastio (14-17-a jc.) pro mortigo de la bestoj kaj malapero de la marĉoj en la meza baseno de Yangzi-rivero.

En la tago, kiam David vidis tiujn elafurojn, scivolemo forte tiklis lin kaj li foje refoje proksimiĝis al la ĝardeno, ekster kiu li longe promenadis kaj ne volis foriri. Finfine venis la ŝanco: en iu obskura nokto li subaĉetis gardiston per 20 taeloj da arĝento kaj akiris kompletan da felo kaj



Aldono de furago



Flustro



Akuŝigo





Esploro pri la vivkutimo de elafuroj

Nutrado





ostoj de elafuro. Li poŝte sendis ilin al Parizo. Post ekzameno fakuloj venis al la konkludo, ke tio estas nova besto neniam antaŭe konata de eŭropanoj.

La afero faris sensacion en Eŭropo. Siatempe Ĉinio troviĝis en la lasta periodo de la feŭda socio kaj estis ege malforta. Kiam la okcidentaj agresantoj sin trudis al Pekino, la kaduka Qing-kortego ne havis forton eĉ defendi sian suverenecon, la elafura ĝardeno do estis komplete prirabita kaj la elafuroj malaperis sur la ĉina teritorio.

La forportitaj elafuroj mortis unu post alia en Eŭropo pro tio, ke ili ne akomodigis al la loka medio. Tiam estis la 11-a Duko de Bedford, kiu aĉetis la elafurojn vivantajn en diversaj lokoj de Eŭropo kontraŭ granda monsumo kaj translokis ilin en fekundan ĝardenon de Woburn-abatejo. Dank' al tio la ĉinaj elafuroj ekhavis kondiĉojn por daŭrigi sian vivon. En la Dua Mondmilito la nombro de elafuroj atingis 255.

## REVENIS LA ELMIGRINTOJ

La 24-an de aŭgusto 1985

aviadilo kun amikeco inter la ĉina kaj brita popoloj transportis 22 elafurojn en Pekinon. La mastro de la brita abatejo, kie vivis la elafuroj, diris: "Revenigi la elafurojn hejmen havas ekstreme gravan signifon kaj por mi kaj por mia familio." Ankaŭ la Specio-defenda Komisiono de la Monda Natur-protekta Unio donis al tio grandan atenton.

Nanhaizi en la suda antaŭurbo de Pekino estas granda lago kun klara akvo vualita de nebulo, kie prosperas salikoj kaj kantas birdoj. Ĝi estis paradizo de la elafuroj kaj ankaŭ la loko, kie ili malaperis. Nun la elmigrintoj revenis al la loko de siaj prapatroj, rapide kuris kaj malaperis en la densa arbaro. En mallonga tempo ili alkitimiĝis al la lokaj medio kaj klimato. Ĉiutage ili libere serĉas manĝaĵojn, gaje blekante. Ili fariĝis sanaj kaj fortaj en la hejmloko.

En la sekvanta somero la elafuroj eniris en la tempon de seksardo. Por gajni elafurinojn la virelafuroj sin ĵetis en kruelan batalon kaj la kornoj kompreneble fariĝis nemankebla batalilo kaj objekto por paradado. Post kruela

kornobatalo la venkinto prenis herbojn per paro da kornoj kaj iris al lagbordo, akompanate de multaj elafurinoj, kaj ĉe la akvo ili ekvivis poligamian vivon kaj kune plenumis la sanktan produktadon, dume la venkitaj virelafuroj povis nur atendi la venontan jaron. Tiu batalo montras la naturan optimumselekton. En tiu periodo la virelafuroj malgrasiĝas kaj ilia pezo reduktiĝas je ĉ. triono.

Por ke la elafuroj estu fortaj kiel eble plej rapide, oni portas fajnan furaĝon al la ĝardeno, ĉar la pli ol 60 hektaroj da marĉo ne povas kontentigi la bezonon de la elafuroj precipe en vintro.

Post longa vintro la gravedaj elafurinoj akuŝas en la komenco de majo. Tiam ili forlasas la kamaradojn kaj serĉas kvietan lokon por nasko. Kaj ĉia ĝeno povas kaŭzi al ili akuŝan malfacilon. La normala akuŝo daŭras ĉ. 3 horojn. Post naskiĝo de la elafurido oni ne devas tuj tuŝi ĝin, ĉar la fremdaodoro povas peli la patrinon for de la ido. Por havigi al la ido kiel eble plej multe da lakto la akuŝinta elafurino formanĝas la placenton. Kiam la patrino



Grego promenanta


forlekas la sangon sur la haŭto de la elafurido, ĉi tiu penas stariĝi kaj stumble sin ĵetas al la sino de la patrino por suĉi lakton. Post duontago la patrino kondukas sian idon en kaŝitan lokon kaj mem revenas al la grego. Poste la patrino iras al la ido por ĝin nutri en difinita horo, kaj kiam la ido fariĝas forta, la patrino kondukas ĝin al la grego, por ke ĝi komencu la komunan vivon.

Ekde novembro de 1993 oni translokis elafurojn de Pekino al la Cigna Marĉo de Shishou ĉe Yangzi-rivero. Tie estas naturparko tre simila al la primitiva ekologia medio kun humida klimato. En la 2 000-hektara marĉo ĉiam kreskas verdaj herboj ŝatataj de la elafuroj. Post kelke da jaroj tie aperis naturaj gregoj de elafuroj, kiuj postvivis la grandan superakvon en 1998. Dum la inundo iuj elafuroj naĝis al grena kampo sur alta loko kaj tie vivtenis sin per grenplantoj, kaj aliaj restis sur izolita insulo en la Cigna Marĉo kaj loĝantoj per ŝipo portis al ili furaĝon. Tiel la ĉinaj elafuroj fariĝis granda familio el 800 membroj. Fakuloj diris al ni, ke nun elafuroj estis jam forstrekitaĵoj el la ruĝa libro de pereontaj animaloj.

## SUGESTO DE ELAFUROJ

La elafuroj, kiel heredaĵoj de

la naturo kaj homa kulturo, kondukas pli bone ol la homoj. Ili vivas harmonie kun la naturo. Por adapti sin al la naturo ili evoluis en la nunan formon: ili faris la cervedajn hufojn tiom dikaj, kiom tiuj de bovo por facile iri en marĉejo, faris la cervedan voston tiom longa, kiom tiu de azeno por forpeli moskitojn kaj muŝojn, faris la cervedajn kornojn iom malantaŭen por ne eniĝi en marĉon, kaj la alte tenata kapo evitigas al ili droni en akvo. Ĝuste pro ĉio ĉi tio la naturo restigis ilin. En sia rilato kun la naturo ili estas fidelaj amikoj de la homoj, kaj je la kosto de la vivo malaperis kune kun marĉo, donante alarmon al la homaro pri ekologia krizo. Fakuloj diris, ke la marĉoj estas reno de la tero, fonto de la akvo. Ili estas utilaj al mildigo de la trosekeco, donante al la homoj fiŝojn, grenon kaj hejtajojn. La marĉoj estas viviga loko, sed dum longa tempo la homa detruado kaŭzis al la terglobo kanceron — teran dezertiĝon, sekve pereis animaloj en marĉoj kaj pliiĝis ekologiaj rifuĝintoj.



Parigo

En la ĉina lingvo la vorto “elafuro” estas samprononca kiel la vorto “vojeraro” (*milu*). La bestoj volas nur vivi, sed la homoj kontentigas sin per mortigo de la bestoj. Retrorigardante sian kelkmil-jaran civilizan historion, la homoj vivas detruante la medion, t.e. ili jam eraris en la vojo. La elafuroj revenis hejmen, kio havas gravan ekologian signifon por montri al la homoj ĝustan vojon. Vidante la bestojn vivantajn en marĉejo, ni konscios la gravecon de la marĉoj.

Elafuroj revenis hejmen kaj ankaŭ la homoj devas reveni al la ĝusta vojo. Nun Nanhazi estas ne nur ekologia eksperimenta centro de elafuroj en Ĉinio, sed ankaŭ medi-eduka bazo de geknaboj de Ĉinio. Tie oni konstruis tombejon por pereintaj bestoj. Sur la mizera tombejo staras 5 krucoj, kie estas skribitaj nomoj de la pereintaj bestoj de la kvin kontinentoj. En la 4-a de aprilo 2000 (Festo de Klara kaj Brilo) aro da blindaj geknaboj vizitis la tombejon. Iu knabo per laŭta voĉo legis:

“La homoj ne devas esti regantoj de la terglobo, sed parto de la tuta natura medio. Memoru: pli da spaco por la bestoj signifas pli da spaco por la homoj mem.” ■

La mastro (la dua de dekstre) de la ĝardeno de Woburn-abatejo vizitas en Pekino la hejmenrevenintajn elafurojn.








Kombatalo pro "reêeco"



En nebulo




"Mi estas reĝo!"







Ripozo



Gardeno de elafuro

# Neĝlando



En la junia numero de 2000 ni konigis al niaj legantoj la lastajn arbohakistojn en nordorienta Ĉinio, kie abundas neĝo. Por protekti la arbaron ili forlasis la hakilojn kaj trovis novan vivmanieron. Post tio ili rimarkis, ke ankaŭ neĝo estas valora riĉfonto kaj, kompreneble, kun ĝi naskiĝis neĝa kulturo...

Teksto de PANG NAIYING  
Fotoj de LIU SIGONG

**L**A forstumejo Shuangfeng de la urbeto Changting sidas en profunda arbaro. En oktobro, kiam ora aŭtuno ĉarmas ekstere, tie en malgranda baseno ofte flirtas neĝflokoj. Kaj la neĝado daŭras ĝis la sekvanta marto. En la tago, kiam ni atingis la lokon, ni estis ravitaj de ĝia beleco.

## NEĜKOVRITAJ DOMOJ KAJ STRATOJ

Malnovaj domoj el arbotrunkoj, similaj al blankaj fungoj kreskantaj el neĝo, kuŝas en malgranda korto ĉirkaŭigita per ligna barilo kvazaŭ skizo lakone farita per nigra peniko sur neĝkovrita tero. En la tagoj de la Printempa Festo sur ĉiuj pordoj nigre lakitaj gluiĝas vers-paroj kaj

bildoj de pordo-dio. La alte pendantaj lanternoj brilas fajre.

Sur kvietaj stratoj foje-foje aŭdiĝis hunda bojado. Maljunulo kun kapuĉo sur la kapo transportis brullignon per sledo. Post kiam li eniris en lignan domon, ekŝvebis fumo super lia domo.

Mi longe staris tie, sentante, ke mi iom post iom fariĝis diafana kaj mem kunfandiĝis kun tiu neĝglacia mondo.

Oni diris al mi, ke ĉiujare la akumulita neĝo dikas plurajn metrojn kaj antaŭe neĝo estis pli abunda, ke ĝi ofte premfaligis la tegmenton de kaduka domo.

Estas interese, ke kiam ni veturis suden 2 horojn de la urbeto Changting, ni tute ne vidis neĝon surstrate, sed post kiam nia aŭto ĝiriĝis ĉe la monteto, ni tuj nin ĵetis en la lokon kovritan de dika neĝo. Kial estas tiel granda diferenco inter la proksimaj lokoj? Eble tion kaŭzis la naturdotita

geografia situo. Mia amiko diris: "La baseno situas en la loko, kie malvarma aerfluo el Bajkalo kuniĝas kun la varma el la Japana Maro, kaj pro la situo en alta kaj malvarma zono la vaporo facile neĝiĝas kaj falas en la basenan fundon, kaj krome, la altaj montoj kaj densaj arboj ĉe la rando de la baseno baras al la vento la vojon, do neĝflokoj flirtas super la baseno kaj donas apartan etoson.

Tie ĉiu domo havas etendiĝantan neĝan tegmentrandon 1-2 m larĝan kaj 1 m dikan, kiu similas al butera kuko. Vilaĝano diris al mi, ke tie la neĝo estas glueca. Vere, kiam la neĝo sur la domo kuniĝas kun tiu sur la tero, la ligna domo fariĝas neĝdomo.

La mallarĝaj vojoj antaŭ la domoj estas malfermitaj sur la dika tavolo da neĝo. Ambaŭflanke de la vojo staras neĝmuroj altaj kiel homo. La vojoj interligas ĉiujn domojn kaj fariĝas efektive stra-




tetoj. Kiam la stratetoj estas kovritaj de nokta neĝo, oni devas fari novajn.

## VARMAJ MUROJ KAJ TERLITO

En neĝa strato mi konatiĝis kun knabo Yunlong. Kiel vigla cervido, li kuris al mi kaj demandis: “Onjo, de kie vi venis? Ĉu vi turismas aŭ intervjuas?” “Divenu mem!” mi respondis. Li ridis kun klinita kapo. Li estis parolema. Li diris al mi, ke li estas 12-jara kaj en la urbeto li vidis neĝan drakon, faritan por la neĝglacia festo, kaj oni faris multe da bestoj el neĝo kaj glacio, sed li preferas la naturajn bestojn. En tiuj tagoj li volonte ĉiĉeronis por mi. Li gvidis min al skiejo. Survoje li demandis min plurfoje: “Onjo, ĉu vi sentas malvarmon? Iru al nia hejmo por vin varmigi.”

En la vilaĝo en ĉiu domo estas varmaj muroj kaj terlito. Por prepari manĝaĵojn oni faras fajron en forno, de kiu fumo iras tra la vaka interno de la muroj kaj terlito, tial la tuta domo fariĝas agrable varma.

Ĉe la varma muro en la hejmo de Yunlong estis sekigata paro da vatitaj ŝuoj kun kaŭĉukaj planumoj. Lia patrino diris al mi: “Tio estas ŝuoj de la patro de Yunlong. Ĉar sur la montoj ĉie estas neĝo,



Loĝdomo en neĝo



Fratoj



Ĉeval-sledo






Avino kaj nepino




"Vidu, kiu el ni estas pli forta!"




Ruĝa lanterno super la neĝkovritaj domoj



Loĝejo en la neĝkovrita urbeto



En nokto



Infanoj en la neĝkovrita urbeto

tial tre facile malsekiĝas la ŝuoj, kaj oni devas kelkfoje ŝanĝi ilin unutage. Sed nun estas multe pli bone ol antaŭe pro uzado de buldozo por forigi neĝon sur la vojoj. Antaŭe oni devis porti tabulojn sub la ŝuoj, alie oni sinkis en neĝkavon kaj malfacile povis iri plu. Por eviti gliton oni devis ligi al la tabuloj porkajn kolharojn.

El la cent familioj tieaj neniu estas indiĝena. Dum la pasinta duonjarcento la elmigrintoj el la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero jam alkutimiĝis al la medio. Ili konservas manĝaĵojn en neĝo, purigas sian domon per neĝo, faras truojn sur glaciiginta rivero por kapti fiŝojn, veturas kaj transportas objektojn per sledo. La patrino de Yunlong diris, ke nun ili akceptas alilokajn turistojn, kiuj tamen ne povas elteni la malvarmon en la tagoj kun temperaturo de 30 °C sub la nulo, tial ili bone hejtas la domon.

## LOKAJ MOROJ

Tie estas malgranda restoracio kun loka gusto. Ĉiufoje, kiam mi eniris ĝin, la mastrino tuj eliris el la kuirejo, forigis la neĝerojn de sur mia vesto, petis min sidiĝi sur varman terliton kaj proponis al mi varman teon. En tiuj tagoj mi ofte vizitis la restoracion, sed mi nur babilis kaj prenis nenium manĝaĵon, tamen ŝi montris neniom da malkontento kontraŭ mi.

La restoracio estas entreprenata de ŝi kaj ŝia edzo. La edzo Liu Mingwen estis estro de la forstumejo. Li emeritiĝis kaj estas amato de fotado. Ili funkciigas la restoracion por akcepti fotistojn venintajn de malproksime. Ili opinias, ke por bone foti oni devas preni manĝaĵojn kun loka gusto. Nun urbanoj tediĝis de grasaĵoj kaj preferas ion alian, tial la restoracio servas al la turistoj per modestaj lokaj manĝaĵoj. Aŭtune la geedzoj ofte kolektas fungojn, orelfungojn kaj sovaĝajn legomojn por la turistoj.

La 15-an de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas la Lanterna Festo en Ĉinio. Ĉe mia endomiĝo la mastrino diris al mi: "Hodiaŭ prenu ĝjaŭzi-ojn ĉe ni! Ni kune preparu la manĝaĵojn." Ĝjaŭzi-oj estas tre

bongustaj kaj ŝatataj. Nun la urbanoj estas tre okupitaj kaj malofte mem preparas tiajn manĝaĵojn. La mastrino bone sciis tion kaj faris tiun proponon.

Sidante sur la varma terlito, ni komencis prepari ĝjaŭzi-ojn. Ni babilis pri tio kaj alio kaj ĉefe pri familio. Ŝi diris, ke siatempe ŝi estis la unua virino, kiu venis de alia urbeto kaj edziniĝis al arbohakisto. Tiam arbohakado estis laboro laciga kaj danĝera, tial malmultaj knabinoj volis edziniĝi al arbohakistoj. Sed ŝi enamiĝis al saĝa kaj honesta junulo kaj volonte edziniĝis al li. Kiam ili havis tri infanojn, ankaŭ ŝi iris labori sur monto, same kiel viroj. Ŝi miris, ke la nunaj gejunuloj prenas eksgeedziĝon kiel bagatelon. Ŝi diris, ke se geedza paro amas unu la alian, malriĉeco estas ne grava.

Kiam ni finis la vespermanĝon, jam mallumiĝis. Eksterdome ĉie lumis lanternoj. El la najbara domo aŭdiĝis knaba voĉo: "Saluton, oĉjo!" Aŭdiĝis obtuza vira voĉo de ĵurnalisto trans la strato: "Saluton." Tion dirante, li premis butonon de la fotilo.

En la neĝa urbeto la turistoj sentis sin tute kiel hejme. En la festotagoj multaj el ili venis tien denove por viziti la lokajn geamikojn. ■



En skiejo





# Produktejo de verdaj agrikulturaĵoj

Fotoj de SUN ZHIJIANG

Moderna agrikultura entrepreno ĉiam havas bonajn projektojn pri plantado. Altproduktaj agrikulturaj teknologioj multe investitaj por senpolua kaj organika agrikulturo, estas aplikataj en tradicia agrikulturo. Oni kompletigas diversajn teknologiojn pri hortikulturo, densa plantado, stereoplantado, biologia insekticido, guta irigacio, sengrunda kulturado kaj frukto-prilaborado. La Pekina Jinxiudadi-a Agrikultura Akcia Kompanio Limigita, sidanta en Sijiqing de Haidian-distrikto, estas tia entrepreno kaj pli ol 70% de ĝiaj alt-teknologiaj projektoj donas profiton.

Dank' al la avantaĝo de la loka fonduso kaj altteknologio, la kompanio akiras plej novajn informojn pri alilandaj sciencoj kaj teknikoj iom post iom turnas tradician agrikulturon en modernan agrikulturon kun alta efiko kaj granda skalo kaj importas el aliaj landoj agrikulturaj produktaĵojn de bona kvalito. Kiam la senpoluaj agrikulturaj produktaĵoj de la kompanio eniras en la merkaton, ili estas laŭditaj de la klientoj.



En plantidokulturejo



Importita florplanto



Klonitaj floroj




Transplantado de legomoj per flasantaj tabuloj



Plantoj legataj en kultura medio





Legomoj vegetative reprodukti



En legom-kulturejo apartigita per floroj



# Inter IJK kaj UK

## — Pensoj pri Esperanto kaj junuloj

*En la pasinta somero mi spertis du kongresojn de Esperanto, la junularan kaj la universalan. La sperto unika por mi vekis en mi pensojn pri Esperanto kaj junuloj, ĉar mi troviĝas preskaŭ inter la junaj kaj nejunaj e-istoj. En UK mi apartenas al la juna grupo, kaj en IJK mi forte sentis mian "maljunecon". Ĉu inter IJK kaj UK ne estas ĝusta loko por pripensi, retrorigardi kaj antaŭvidi?*

de YU TAO\*

**Ĉ**I-JARE la kongreso en Tel-Avivo estis mia dua UK kaj tiu en Hongkong — mia unua IJK. Dum la komitata kunsido de UEA mi trovis nur unu aŭ du kompare junajn vizaĝojn. Kaj multe da kongresanoj estis mezaĝuloj kaj maljunuloj.

Pro la neĉeesto de TEJO-estraranoj, en la solena malfermo de la UK mi faris parolon reprezentante de TEJO kiel ĝia komitatano. Antaŭ ĉ. mil kongresanoj mi diris: "Mi ne volas diri, ke la junuloj kaj la plenkreskuloj en nia Esperantujo havas tute saman manieron kongresi, seminarii,

diskuti, rezolucii ktp. Mi tamen deziras konfirmi, ke ni havas saman idealon kaj komunan celon, por kiu ni ĉiuj pretas kontribui."

### IJK KAJ UK

Jes, en UK mi vidis sufiĉe da tradicioj. La fama kroata aktorino Vida Jerman denove ricevis aplaudadon, la usona profesoro Humphrey Tonkin allogis pli da aĉetantoj dum la aŭkcio kaj pli da aŭskultantoj en IKU, ankaŭ la kongresa libro restis en fiksa formo, en la inaŭguro aŭdiĝis la "tradiciaj" salutoj de ĝenerala sekretario de UN kaj ĝenerala direktoro de Unesko, kaj tiu de la "fama nepo" Zaleski-Zamenhof.

Por multaj samideanoj UK

estas simbolo de nia movado. Ĝi montras, ke Esperanto estas vivanta lingvo. Miloj da kongresanoj, altnivelaj prelegoj, profesiaj artaj prezentoj, diskutado pri esperantologio kaj la strategio de la movado, ĉio ĉi atestas, ke nia movado estas matura, konscia kaj stabila. En tiu senco, tradicio kaj reguleco estas tre gravaj por UK.

Kaj en IJK estas pli da varioj — ĉiam nova maniero por inaŭguro kaj fermo, tute diferencaj kongresaj libroj, malsamaj ankaŭ la emblemoj sur la kongresa flago, manko de rezolucio, malofta kantado de la himno "La Espero"... He, mi ja ne povus ne menciigi la tradicion de IJK: *dis-ko-danco*, bierumado kaj babilado



Junaj e-istoj el diversaj landoj



S-ro Sjoerd Bosga prelegas pri la E-movado.

ĝis post noktomezo.

## GRUPO "PER" KAJ GRUPO "POR"

Fakte, ni havas diversajn manierojn por ĝui nian lingvon. Mi kredas, ke estas nur malgranda parto, kiu ofte partoprenas



E-lernado

grandajn kongresojn, kiel UK kaj IJK. Pli multaj aliaj prelegas, studas en seminarioj, babilas kaj kunsidas en klubo aŭ libertempas en kunloĝado. Iuj abonas gazetojn, aŭskultas radio-elsendon, korespondas, verkas ktp.

Junuloj ne tiom multe diskutas pri la Esperanto-movado. Ili nur uzas la lingvon. Multaj el ili apartenas al la grupo "per". Per Esperanto junuloj ricevas amikecon, vojaĝas tra la mondo, kolorigas sian junecon kaj konas

diversajn kulturojn. Tio estas ĝusta vojo por evoluigi Esperanton: unue oni konscias ĝian utilecon kaj uzas ĝin por diversaj celoj, kaj poste, se iuj havas entuziasmon, ili sin dediĉos al disvastigo de Esperanto. Ĉu estas granda diferenco inter la grupo "per" kaj la grupo "por"? Laŭ mi, ne tre. Se iu bone vivas el Esperanto, tio allogos multajn aliajn al ĝia uzado. La sukceso de la grupo "per" estas bona pruvo por diskonigi nian lingvon. Por esti aktivulo de la grupo "por", oni unue devas havi multe da sperto de "per Esperanto".

## UEA KAJ TEJO

En mia parolado en Tel-Avivo mi diris ankaŭ: "Multaj el la talentuloj de nia movado aktivis en TEJO-kampo en sia juna aĝo. Tial la nuna juna movado donas bildon de la estonteco de nia movado."

Sjoerd Bosga, prezidanto de TEJO, estas unu el la plej spertaj en la junulara movado. Mi konatiĝis kun li antaŭ 6 jaroj. En

la TEJO-KER-Seminario en Strasburgo mi unuafoje spertis la junularan movadon de Eŭropo. Sufiĉe da aktivuloj tiamaj ne plu aktivas en TEJO, sed Sjoerd restas. Mi tre dankas lin, ĉar por labori kiel prezidanto de TEJO necesas ne nur entuziasmo, sed ankaŭ talento, kaj pli grave, devokonscio. Li dufoje venis al Hongkong por IJK kaj multe laboris antaŭ, dum kaj post la kongreso. Same kiel multaj LKK-anoj, Sjoerd ne multe ĝuis la kongreson, kaj ni ĝuis la laboron.

Oni restas en la junulara movado en nelonga tempo, du-tri jarojn, aŭ ses-sep jarojn. Kaj poste oni eklaboros, edz(in)iĝos kaj patr(in)iĝos, tiel oni ne havas tempon por Esperanto. Kiam la vivo stabiliĝos, oni revenos al la movado.


La periodo inter IJK kaj UK estas tempo por sin prepari, estas tempo por transiro de TEJO al UEA.

Ni deziras, ke inter IJK kaj UK, inter TEJO kaj UEA ne estu granda distanco, por ke junuloj rapide maturiĝu kaj kontribuu pli multe. ■

\* Ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, prezidanto de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio kaj vicĉefredaktoro de "El Popola Ĉinio"




Telferoj trans la lago



Vizitantoj sur kameloj



# Vidindejo Shahu



Fotoj de YU XIANGJUN

Estas interese vojaĝi al la vidindejo Shahu en la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, nordokcidenta Ĉinio. Ĝi estas bela natura vidindejo kun harmonia unuiĝo de dezerto kaj lago.

Ĝi situas en Yinchuan-ebenaĵo kaj estas multe favorata de la Flava Rivero. Dum jarmiloj oni ne nur irigaciis kampojn per akvo el la rivero, sed ankaŭ fosis kanalojn kaj pro tio tie aperis densa irigacia reto. En la senli-

ma dezerto en tiu malalta loko iom post iom akumuligis multe da akvo kaj fine formigis vasta lago.

La turo ĉe la lago ebligas birdvidon al la lago kun senlima fragmitaro kaj sablaj montetoj en 2 000-hektara dezerto. En la lago vivas dekkelkaj specoj da fiŝoj, kaj en la fragmitaro kelkdek specoj da raraj birdoj. Printempe kaj aŭtune tie flugas sennombraj birdoj, kiuj kvazaŭ nuboj ŝvebas sur la ĉielo.



Malsupren de sabla deklivo

# Bela spektaklo en universitato

Post serioza elekto kaj streĉa trejnado la modeloj sursceniĝis unu post alia kaj montris en la lerneja korto novajn vestojn kun famaj markoj.



En la universitato okulfrapas la slogano kun vortoj alirantaj studentojn al spekte de vestomontrado

de GU YINGLI

**E**N la jaro 2000, ĉe la sojlo de la nova jarcento, furoro kaj modo senbrue englitis en la kvietan universitatan korton.

En bela junia tago la Etiketa Centro de la Nankina Universitato okazigis vesperon por montri printempajn kaj somerajn studentajn vestojn, kiu altiris al si multajn studentojn. Post serioza elekto kaj streĉa trejnado la modeloj sursceniĝis unu post alia kaj montris en la lerneja korto novajn vestojn kun famaj markoj.

En la hodiaŭa universitata korto la studentaj organizaĵoj pli kaj pli multiĝas. En la postlecionaj horoj la studentoj partoprenas diversajn aktivadojn ĉiu laŭ sia plaĉo por igi sian vivon enhavoriĉa kaj larĝigi la vidkampon, levi la kapablon de societemo. La Etiketa Centro fondiĝis antaŭ nelonge,

tamen havas multajn membrojn. En ĝia aktivado la bela staturo kaj distingigaj vestoj kune formis



“Ĉu mi estas bela?”

belan spektaklon.

La Etiketa Centro disvolviĝis el ceremonia taĉmento fondita en 1993. Nun ĝi konsistas el sekcioj trejna kaj propaganda, ceremonia taĉmento kaj grupo de modeloj. Ĉiujare la trejna sekcio akceptas multajn membrojn, kiuj post sistema trejnado aliĝis al la ceremonia taĉmento aŭ grupo

de modeloj.

En afiŝo de la centro legiĝas jenaj vortoj: “Se vi volas fariĝi pli bela, aliĝu al nia vicaro kaj elvolu vian latentan belecon por montriĝi antaŭ la publiko kun plena memfido.” La centro ne nur trejnias siajn membrojn en konduto, sed ankaŭ akcentas levi ilian kulturalan nivelon kaj estetikon.

Jam en la unua leciono de la centro oni diris al la kursanoj, ke kiel reprezentantoj de la lernejo en la ekstera mondo, ili devas havi ne nur belajn aspekton kaj staturon, sed ankaŭ artan klarecon kaj memfidon. En sabato ili kutime ricevas korpan ekzercadon en la sporta halo de la lernejo. Tiam akompanate de belsona muziko de piano ili dancas sur verda tapiŝo kaj la ĉirkaŭaj speguloj reflektas iliajn belajn figurojn, sed post la du-hora trejnado ili revenas al sia loĝejo lacegaj. Ĵaŭde estas diversaj prelegoj en la centro temantaj pri etiketo, beligo, estetiko, fotado, fasonado ktp. La prelegantoj estas fakuloj de diversaj rondoj.

Krom lernado la kursanoj partoprenas ankaŭ ceremonian servon kaj montradon de modaj vestoj. De post 1998 ili partoprenis servadon pli-ol-50-foje, kiaj tiu por tutlanda kongreso de protekto de vegetaĵoj kaj tiu por premiero de la filmo “Manku neniu”. Ili estis premiitaj multfoje.

Por la kursanoj partopreni la aktivadon de la centro estas nur



Vestomontrado



Sur T-scenejo

malgranda parto de ilia vivo. Krom studi, ili havas ankaŭ diversajn hobiojn. Ili multe rikoltis en la centro. Ili opinias, ke kvankam ili ne fariĝos profesiaj etiketaj servistoj, tamen la trejnado donas al ili apartan sperton kaj memfidon, kio tre utilas al ilia estonta laboro.

Krome, la centro mem okazigis plurajn grandajn aktivadojn. Ĉiujare dufoje ĝi anoncas pri modaj fasonoj de studentaj kostumoj kaj organizas kune kun iuj kompanioj grandan ekspozicion. Studentoj faras ĉiujn laborojn: kontakto kun entreprenistoj kaj ĵurnalistoj, redono de la rekvizitoj kaj sendo de leteroj. Kaj la studentoj ne nur levis la kapablon de organizado, sed ankaŭ kulturis solidan laborstilon. La junian vesperon ili preparis plurajn monatojn. Ili perfekte faris projektadon, aranĝon, monkollektadon kaj prezentadon. La prezentado akiris grandan sukceson kaj la centro donacis la tutan monsumon akiritan el la eniraj biletoj al studento, kiu pro grava malsano bezonas monhelpon.

Antaŭ nelonge la etiketa centro lanĉis sian hejmpaĝon: <<http://dii.nju.cdu.cn/Liyi>>. Kontaktiĝu kun ĝi kaj vi akiros freŝdatajn informojn kaj vidos belajn kaj memfidajn figurojn. ■

● La Internacia Olimpika Komitato aprobis Pekinon kiel unu el la 5 kandidatoj por gastigo de la Olimpiaj Ludoj en 2008. La aliaj 4 urboj estas Istanbul, Osako, Parizo kaj Toronto.

La plej grava laboro nun por Pekino estas plibonigo de ĝia ekologia medio.

● Jam finkonstruiĝis kaj transdoniĝis al trafiko la Wuhu-a Pontego super Yangzi-rivero. La staja pontego kun larĝa spano kaj malaltaj turoj estas uzata por ŝoseo kaj fervojo.

Ĝi estas 10 020.96 m. longa, kaj la ĉefa parto super la rivero longas 312 m. Ĝia konstruo kaj skalo superis tiujn de la pontegoj en Wuhan kaj Nankino.

● La kugloforma elektra lokomotivo Lanjian estas fabrikita en Ĉinio. Ĝi povas kuri 305 km hore laŭ la projekto. La unuaj 8 tiaj lokomotivoj post nelonge funkcios sur la Ekspresa Fervojo inter Kantono kaj Shenzhen.

● Ĉinaj sciencistoj per nova teknologio nanometro multe levis la fandopunkton de membrano kaj tiamaniere solvis malfacilan problemon en la scienca kampo.

Sciencistoj diris, ke la epoko de nanometro venos post nelonge. La tekniko estos aplikata certe pli multe ol komputoriko kaj fariĝos kerno de la informadika epoko en la estonteco.

● La 19-an de aŭgusto 2000, ĉindevena usonano sciencistino Chen Xiaoning venis Ĉinion por krei sian karieron kunportante 3 genobankojn.

Tio estas banko de homaj genoj por klono, tiu de homaj genoj por sondo kaj tiu de kobaj genoj por klono kaj sondo. Tiuj sciencaj fruktoj nun ankoraŭ ne troviĝas en Ĉinio kaj ili estas avangardaj internacie. Oni diris, ke tiuj tri bankoj

estas utilaj al studo pri genoj en Ĉinio, biologia disvolviĝo kaj klinika diagnozo.

● La hibridigita kotono kun transformita geno Sanxi atingis grandan progreson en Zhejiang-provinco. Tio estas alia grava sukceso post utiligo de la hibridigitaj semoj de rizo kaj kolzo. Tio espereble finos la historion de kotonkulturado per homa polenado.

Eksperto pruvis, ke ĉiu kotonujo povas produkti meznombro 15.4 kapsulojn, je 16.7% pli multe ol la tiea ordinara kotonujo.

● En Ningshan-gubernio de Shaanxi-provinco oni trovis raran nigran graniton kun rezervokvanto de miliono da kubmetroj. Post polurado ĝi impresas kiel valora gemo.

Ĝiaj koloroj varias pro ŝanĝiĝo de vid- kaj lumanguloj. Ĝi estas bela, valora konstrua materialo.

● Maje ĉi-jare, kamparano en Sichuan-provinco naskis kunigitajn ĝemelojn 7.5 kg pezajn. La du knaboj estis ligitaj je la brusto, ventro kaj koro kaj havis komunan hepaton.

Aŭguste ĉinaj medicinaj fakuloj faris operacion por ili. Antaŭ ĉio la kirurgoj disigis ilin kaj riparigis al ili la koron kaj tuj poste apartigis la hepaton. Oni diris, ke tio estas la unua tia operacio sukcese farita en Ĉinio.



Chen Xiaoning metanta en fridon la genobankojn ĵus alportitan el eksterlando



## TERMOFONTOJ EN PEKINO

Pekino estas urbo riĉa je termofontoj. Nun tie oni havas 180 putojn, kiuj plejparte estas termofontoj mezvarmaj kun akvo bonkvalita, malalte mineraligita kaj malaltdura, kaj riĉaj je kalio, natrio, kalcio, magnezio, fluoro kaj radiumo. Tia akvo estas utila por kuraci dermozon, artriton k.a.

La termofonto Xiaotangshan en la norda antaŭurbo de Pekino estis konata jam antaŭ 400-500 jaroj. Tie nun funkcias sanatorio. Dekmiloj da suferantoj de kronikaj malsanoj estas tie kuracataj.

En la urbo estas multaj termofontaj banejoj luksaj, meze pagigaj kaj ĉipaj. En Shunyi-distrikto estas termofonta banejo, kiu kovras 100 000 kvadratajn metrojn kun fontoj medikamenta, varma-malvarma kaj kota.

En 1998 oni fosis termofontan puton en nova kvartalo de vilaoj, kie oni povas bani sin en termofonta banejo. Pro tio la domoj de tiu kvartalo estis rapide forvenditaj. Sole en la lasta duono de 1999, 29 bien-disvolvaj kompanioj montris sian deziron ekspluati termofonton.

Hejtado per tervarmo donas avantaĝojn, kiel ŝparo de elektro, karbo kaj homfortoj, kaj nepoluado, tial la pekina registaro prenis hejtadon per tervarmo kiel unu el la kontraŭpoluaj rimedoj.

## SUBTERAJ PEJZAĜOJ

En la montetoj je 3 km. norde de Longyou, malgranda gubernio de Zhejiang-povincio, oni trovis 50 artefaritajn grotojn grandajn kaj malgrandajn, bele aranĝitajn. 5 el ili estis malfermitaj al la turistoj.


La formo kaj grandeco de la grotoj estas preskaŭ samaj. Ili

areas kelkcent ĝis mil kvadratajn metrojn kaj altas 20-40 metrojn. Ilia enirejo estas rektangula kaj iliaj muroj apikaj kun arka tegmento. En ĉiu groto staras 2-5 gigantaj kolonoj, el kiuj la dikaj estas brakumeblaj por 5 homoj. La tegmento, muroj kaj kolonoj ĉiu havas delikatajn oblikvajn striojn similajn al tigraj makuloj. De la enirejo ĝis la fundo estas larĝa ŝtona ŝtuparo. Sur la fundo estas 1-2 artefaritaj ŝtonaj cisterno kaj deklivoj.

Post esplorado fakuloj diris, ke la gubernio Longyou en la supra baseno de Qiantang-rivero havas historion de 2 500 jaroj. La tieaj ŝtonaj grotoj estis faritaj jam en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.) por konservi grenon kaj aliajn varojn. Post ekspansiigo kaj riparado ili ekhavis la hodiaŭan amplekson. Ĉe Tongtan-monto aperis tenejo jam en Sui-dinastio (581-618).



Artefaritaj terasoj kaj deklivoj en la groto



Bildoj de ĉevaloj kaj birdoj sur la muro de la groto

Kvankam oni ankoraŭ ne plene malkovris la misteron de tiuj grotoj, tamen oni almenaŭ povas konkludi, ke la grotoj estas grandioza subtera konstruaĵaro en la mondo. Krom tio ili donis fidindan ateston por la tezo de iuj alilandaj fakuloj "groto-konstruado estas la kvina invento de la ĉinoj".

## TAJDO DE QIANTANG-RIVERO

"La tajdo en la 18-a de la oka monato laŭ la ĉina luna monato estas plej impona sub la ĉielo," la ĉinoj tiel admiras la tajdon de Qiantang-rivero.

Qiantang estas la plej granda rivero en la provinco Zhejiang. Kvankam ĝia fluso estas ordinara fenomeno de la maro, kiu okazas dufoje ĉiutage, kaj la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas la plej alta tajdo, tamen la enmariĝo de Qiantang-rivero estas 100 km larĝa kaj ĉe Yanguan de la urbo Haining la larĝeco de la rivero reduktiĝis al 3 km, kaj plie tie estas multaj montoj, tial tie la riverlito abrupte leviĝas. Kiam okazas alta tajdo, la antaŭaj ondoj kuras malrapide kaj la sekvantaj kuratingas impete. Jen la postaj ondoj pelas la antaŭajn, kaj ili leviĝas alte kaj kuras lavange.

La 18-an de la oka monato

laŭ la ĉina luna kalendaro ĉi-jare estis granda spektaklo en Haining. Frumatene tiutage la turistoj arope venis sur la grandan digon de Qiantang-rivero kaj rigardis foren al la malsupra parto de la rivero. Antaŭ la fluso la akvo kviete fluis orienten kaj maldensa nebulo ŝvebis super la rivero. Fore kelkaj montetoj jen aperis jen malaperis en la nuboj. Proksime antikva pagodo staris tuj ĉe la rivero.

“Jen la tajdo!” Ĉe la krio ĉiuj turnis sian rigardon foren kaj vidis, ke ĉe la horizonto aperis malklara blanka linio kaj post momento la linio fariĝis pli kaj pli dika, kiu fine fariĝis blanka murego 5-6 m alta sur la rivero kaj kun tondra bruo sin ĵetis antaŭen. Je tio la homoj kun timego kuris malantaŭen. Historia libro notis, ke iam ondegoj 8 m altaj formovis feran bovon 1.5 tunojn pezan de la riverbordo.

Estas interese, ke se oni konas la rapidecon de la ondoj, oni

povas vetkuri kun la ondoj per aŭto. Fine oni povas spekti la spektaklon de la retroirantaj ondoj ĉe Laoyancang.

## LINGNAN-AJ ĜARDENOJ

Lingnan estas regiono sude de Dayu kaj aliaj 4 montoj. Ĝi situas ĉe la norda tropiko kaj tie regas musona klimato kaj ĉiam aromas floroj. La loko estas abunda je belaj stalaktitoj. De antikve tie oni kutime konstruas ĝardenon en sia loĝejo por reguligi la klimaton, kaj de tio formiĝis la aparta stilo de Lingnan-aj ĝardenoj, praktikaj, belaj kaj elegantaj.

Guangdong-provinco estas ĉefa loko de Lingnan-aj ĝardenoj, kaj la antikvaj Lingnan-aj ĝardenoj povas dividiĝi ĉefe en du kategoriojn: la loĝdomaj kaj pitoreskejaj.

El la tieaj tradiciaj ĝardenoj la eminentaj estas Qinghui-ĝardeno en Shunde, Keyuan-ĝardeno

en Dongguan kaj Liangyuan-ĝardeno en Foshan, kiuj estas kompare malgrandaj. Yuyinshang-ĝardeno de Panyu, konstruita en 1871, estas fama pro sia delikateco. La ĝardeno, artisme aranĝita, enhavas bele dekoritajn domon, kioskon, ponton, artefaritan monteton kaj lageton de 0.2 hektaro. En la ĝardeno aromas floroj, prosperas arboj, krispiĝas ondoj sur la klara lageto. La vizitantoj povas ĝui la ruĝajn lotusflorojn en la lageto. La ĉeakva pavilono estis loko, kie la mastro improvizis poemojn kaj ĝuis la lokajn pejzaĝojn. Printempe kaj somere la ĝardeno allogas multe da turistoj.

La Lingnan-aj ĝardenoj estas popolaj kaj diferencas de la grandiozaj imperiestraj ĝardenoj en Pekino kaj de la privataj ĝardenoj en Suzhou. Ili elspiras arkitekturajn trajtojn de la ĉinstilaj ĝardenoj kaj portas apartajn lokajn karakterizaĵojn pro malsamecoj geografia, klimata kaj kultura.



En ĝardeno de Lingnan



## ĈINIO

● Viglas E-movado de la urbo Zaozhuang, Shandong-provinco. En la jaro 1999 estis elektita kiel bona popola organizo de la provinco la E-asocio de Zaozhuang, kiu havas 80 membrojn kaj kelkajn sekciojn: medcina, junulara kaj ekonomi-komerca. En la lastaj tagoj la estraro de la asocio sukcese finis sian servoperiodon kaj oni elektis la novan.

(Zhang Zhaogeng)

● Por helpi komencantojn memori Esperantaj vortojn, Jiang Yunlin, vicprezidanto de la E-asocio de Fujian-provinco, faris la manuskripton de "Facila memorado de Esperantaj vortoj". Sed pro manko de monrimedoj ĝi ankoraŭ restas en lulilo.

(Xu Peiying)

## JUGOSLAVIO

● Okaze de Zamenhofa Festo de la jaro 2000 esperantistoj el Niŝ, kunlaborante kun SEL, JEL, JAFE kaj Esperanto-instituto Beograd, organizos Tutlandan Zamenhofan Feston de la 15-a ĝis la 17-a de decembro 2000. Korespondadreso: Momcilo Krstic — Moma, str. Branka Miljkovica No.14, 18000 Niŝ, Jugoslavio. Telefono: (018) 322-609. Retpoŝto: [zciric@eunet.yu](mailto:zciric@eunet.yu)

(Momcilo-Moma Krstic)

## KOLOMBIO

● La Aktiva Bogota Esperantista Junulara Asocio, kiu naskiĝis ĉi-jare, sukcese okazigis la Unuan Kolombian Junularan Kongreson inter la 5-a kaj la 7-a de aŭgusto 2000. La kongreso havis 43 partoprenintojn el kvin urboj de la lando: Bogoto, Kali, Ibageo, Soacho kaj Fusagasugao. Gejunuloj kaj "veteranoj" intermiksiĝis por pasigi tri neforgeseblajn tagojn en la eleganta bogota lernejo Thomas Jeffer-

son, kiu servis kiel kongresejo. (Ricardo Carrillo)

## NEDERLANDO

● ZAANDAM, Esperanto-hungara ceramikaĵo sur nederlan-



Ceramikaĵo sur domfasado por la E-strato

da domfasado (1993).

Tiu ceramikaĵo (5040 cm) estis destinita al la Esperanto-Strato en la hungara urbo Hodmezovasarhely kaj mendita de la urbestro al la skulptisto Sador Jozsai; ĝi estis, post la fabrikado, malmendita. Dank' al amikaj rilatoj, samideano Ko Hammer ricevis la stratpanelon "ESZPERANTO", kiun li enmurigis sur la fasado de sia domo ĉe Ta-

xusstraat 7. Foto en junio 2000 farita de Ko Hammer.

(Raymond Bore el Francio)

## POLLANDO

● La XXII-a Ĉebalta Esperanta Printempo ĉi-jare kiel kutime okazis en Mielno, Pollando, de la 30-a de majo ĝis la 11-a de junio 2000. Partoprenis 80 esperantistoj el 10 landoj. Oni loĝis en bela, moderna ripozdomo nomata "Grajina". La programero estis tre ampleksa. Krom lingvoperfektigado de 3 grupoj, kantado kaj dancado, okazis ankaŭ 2 tuttagaj kaj 1 duontaga ekskursoj.

(Eugeniusz Rybarczyk el Danio)

## VJETNAMIO

● Je la 30-a de julio 2000, en la salonego de la televida stacio N-ro 5 strato Huynh Thuc Khang okazis la bilanco de ses-monata agado de la Hanoja Esperanto-Asocio (HANEA). Pli ol 200 geesperantistoj de 7 sekcioj de Hanojo ĝin partoprenis. Oni subskribis en la flago de "Jaro de Kulturo kaj Senperforto". Prezidanto de HANEA raportis pri la internacia E-konkurso "Hanojo, via rendevuo". Bv. viziti TTT-ejo: [www.hanea.vnn.vn](http://www.hanea.vnn.vn)

(Nguyen Van Dien)



Partoprenantoj de la Kvara Kongreso de Kroataj Esperantistoj





Flugigo de helikoptera modelo



## Maniuloj de teleregaj modeloj

Teksto kaj fotoj de XU XIAORAN kaj ZHANG HAITAO


Ĉi tie ni konigas al vi aktivadon de amatoroj de aer- kaj mar-navigacioj kaj aŭtostirado de modeloj. Kvankam diferencaj en aĝo, vivsperto kaj animstato, ili ĉiuj estas maniuloj de teleregaj modeloj.

Tiuj modeloj ne estas simplaj ludiloj. Por ilin manipuli necesas havi sciojn de projektado, materialoj, mekaniko, radiotekniko kaj integra cirkvito. Ne estas troigo diri, ke la modeloj montras la scian kapablon kaj sintezan projektan nivelon de la lando.

Konatiĝinte kun tiuj amatoroj, vi scios, ke ili estas ankaŭ sciencaj maniuloj.



Novtipa aŭto-modelo



Ekflugigo




Vendejo kun  
diversaj modeloj



En vendejo de auto-modeloj



Lanĉo de ŝip-modelo




J-32



Riparo

Provado



Kursanoj

Kampanaroj altiritaj





# Nacimalplimulta urbo

## Jishou

Jishou situas en longa ravino. Jam antaŭ 1 000 jaroj tie estis vilaĝo. Sed pro malhelpo de altaj montoj kaj longeco de vojo kondukanta al urbo la loko evoluis malrapide, kaj en 1950 ĝi havis malpli ol 10 mil loĝantojn.

---

Teksto de WANG HANPING  
Fotoj de WU TINGHONG kaj  
SHA GANG

---

**E**N la nordokcidento de Hunan-provinco, de la antikveco vivas tuĝja-oj, mjaŭ-oj kaj aliaj nacimalplimulto. En 1957 tie fondiĝis la Tuĝja- kaj Mjaŭ-nacia Subprovinco kun Jishou kiel sia ĉefurbo. En 1988 nia revuo raportis pri Jishou. Aŭguste ĉi-jare mi vizitis ĝin kaj trovis, ke ĝi multe ŝanĝiĝis.

### DISVOLVIĜO EL URBETO


Jishou situas en longa ravino. Jam antaŭ 1 000 jaroj tie estis

vilaĝo. Sed pro malhelpo de altaj montoj kaj longeco de vojo kondukanta al urbo la loko evoluis malrapide, kaj en 1950 ĝi havis malpli ol 10 mil loĝantojn. En 1982 ĝi fariĝis urbo el urbeto kaj ekhavis kompletan planon por sia estonteco, kaj ĝi suriris la vojon de rapida disvolviĝo.

En la komenco la urbo areis nur 4.5 kvadratajn kilometrojn, kaj en ĝi estis neniu aŭtobuso kaj funkciis nur 2 trunkaj vojoj kun totala longeco de malpli ol 4 kilometroj. Post pli-ol-10-jara konstruado la urbo havas areon de 13.5 kvadrataj kilometroj, kun 150 000 loĝantoj. Nun en ĝi estas pli ol 20 trunkaj vojoj, el kiuj

la plej granda estas Renminlu-strato 24-40 metrojn larĝa kaj 16 kilometrojn longa. Ĝi havas ne nur aŭtobusojn, sed ankaŭ taksiojn.

Komence de la 80-aj jaroj en Jishou estis nur kelkaj butikoj. Kaj la popolo loĝis en grizaj kabanjoj el tero aŭ lignaj tabuloj. De la fotoj faritaj antaŭ 12 jaroj ni vidas kelke da 5-6-etaĝaj domoj, sed nun, se vi rigardas malsupren, starante sur la montosupro Dongmenpo en ĝia parko, vi vidos multege da altaj domoj, kiuj impresas kiel moderna urbo. La plansetlejoj multe plibonigis la vivkondiĉojn de la loĝantoj. En la pasintaj 10 jaroj 25 000 loĝan-



La manlibro Jishou

toj transloĝiĝis el kadukaj kaban-  
 ojn en grandajn helajn domojn.  
 Samtempe kun tio aperis komer-  
 caj domoj, i.a. la Komerca Cen-  
 tro investita de entreprenistoj de  
 Jishou kaj Hongkong areas 2 hek-  
 tarojn, kun plank-areo de pli ol  
 40 000 kvadrataj metroj. Nun ĝi  
 estas plej movoplana en Jishou.

En la Komerca Centro mi  
 vizitis esperantiston Luo Ming-  
 wei. Lia vendejo kun diversaj  
 modaj vestoj sur Hongkong-strato  
 altiris al si multe da klientoj. Luo  
 diris al mi, ke komence li havis  
 nur vestostandon kaj poste, kiam  
 naskiĝis la Komerca Centro, li  
 aĉetis unu ĉambron per sia ŝpar-  
 mono. Dank' al sia sperta entre-  
 prenado la vendejo ĝuas bonan  
 reputacion en la loko. Li eĉ live-  
 ris vestojn al anoncistoj de TV-  
 stacio de la urbo. Li diris al mi  
 ankaŭ, ke li ne atendis, ke multe  
 ŝanĝiĝis lia vivo. Nun li volas  
 ekspansiigi la vendejon.

## PENADI POR NOVA DISTRIKTO

Laŭ nova disvolva plano,  
 Jishou kovros areon de 74  
 kvadrataj kilometroj. Ĉar en la



orienta kaj okcidenta flankoj de  
 la urbo estas montoj kaj la urbo  
 havas formon de rubando, kiu  
 iagrade limigis ĝian disvolviĝon,  
 tial la urba registaro decidis krei  
 novan distrikton Qianzhou 5 kilo-  
 metrojn sude de la urbo.

Akompanate de vicestro de  
 la subprovinco kaj prezidanto de  
 la konstrua komisiono de la urbo,  
 mi vizitis la novan distrikton  
 konstruatan. Sur granda konstru-  
 ejo bruis buldozoj kaj ŝvitlaboris  
 konstruistoj. Nun estas jam pre-

tigita la vojo meze de la distrik-  
 to, kaj ankaŭ la komercaj kvarta-  
 loj havas rudimentan formon.

Laŭ la plano, en 2002, kiam  
 Jishou celebros sian 20-jaran ju-  
 bileon, plenumiĝos la unuaperi-  
 oda konstruado de la nova dist-  
 rikto, tie ekfunkcios entreprenoj  
 kaj registaraj departementoj kaj  
 tien transloĝiĝos multaj loĝan-  
 toj.

En la estonteco Qianzhou-  
 distrikto estos la administra cen-  
 tro de la urbo, destinita ĉefe por  
 disvolvi komercon, altan teknologion k.a.  
 Laŭ la plano, en 2020  
 la nova distrikto are-  
 os 15 kvadratajn  
 kilometrojn kun  
 100 000-150 000  
 loĝantoj.

Post kiam aperos la  
 nova distrikto, Jishou  
 havos 300 000 loĝan-  
 tojn kaj enviciĝos in-  
 ter la mezgrandaj ur-  
 boj de Ĉinio, kaj ĝi ne  
 plu estos nur urbo de  
 distribuo de varoj ĉe la  
 limo inter la 4 provin-  
 coj, sed eĉ centra urbo  
 de tiu regiono kaj lu-  
 dos gravan rolon en  
 nacimalplimulta  
 ekonomio kaj socia  
 disvolviĝo de la regio-  
 no. ■





# Drivo sur Maoyan-rivero

Grandaj ondoj atakis nin kaj la kajako tangis forte. Kvankam ni portis savjaron kaj havis tuĝja-on kiel gvidanton, ni ankoraŭ sentis timon firme kaptante la sekurŝnuron.

de PANG NAIYING

**E**N la sama monato de la pasinta jaro mi drivis sur Maoyan-rivero en la okcidento de Hunan, Ĉinio. La rivero ĝuigis al mi belajn pejzaĝojn, kaj ĝi ankaŭ estas profunda historia tunelo.

Ĉe la kajo la surfaco de akvo estis ebena kaj vasta. Baldaŭ ni endrivis en kanjonon, kaj tuj prezentiĝis al niaj okuloj ambaŭbordaj verdaj montoj, la ĉielo malvastiĝis kaj malheliĝis, la rivero mallarĝiĝis kaj kurbiĝis, kaj akvo muĝante ŝprucis el inter du montoj. Sur la krutaĵo akvofalo, kiu torentis suben el mistera kaverno, tondris en la kanjono kune kun la ondoj. Nia kajako kaj estis puŝata al ondopinto kaj turniĝis en kirlo. Grandaj ondoj atakis nin kaj la kajako tangis forte. Kvankam ni portis savjaron kaj havis tuĝja-on kiel gvidanton, ni ankoraŭ sentis timon firme kaptante la sekurŝnuron.

Estas rakonto pri Maoyan-valo. Antaŭ pli ol 600 jaroj tuĝja-oj malriĉe vivis en kaverno kaj kulturis teron en primitiva maniero. La kortego kruele kolektis imposton kaj kolerigis ilin, kaj iu junulo nomata Tan Hou levigis en insurekcio.

Maoyan-valo havis altajn montojn, profundan riveron kaj multe da kavernoj. Profitante danĝeran topografion, Tan Hou kaj aliaj fondis bazlokon kontraŭ malamikoj. Maogang-vilaĝo estis ĉirkaŭita triflanke de klifoj ĉe akvo, kaj unuflanke estis vojeto. Se oni volis atingi Yujia-vilaĝon, oni devis uzi kabloponton. Sur la montoj de Maogang-vilaĝo la loĝantoj faris pulvon kaj armil-

ojn kaj uzis iujn kavernojn kiel grenejojn, porkobredejojn kaj ŝafstalojn; kaj en akvokaverno ili kaptis fiŝojn. La plej granda kaverno estis utiligata por konservi armilojn, kaj kaverno povis enteni milojn da homoj. Antaŭe ĝi servis ankaŭ kiel rifuĝejo. Kvankam ĝi havis 6 aperturojn, tamen nur unu estis enirebla per boato, ĉar ekster la aperturo estis profunda kaj vasta akvo.

Natur-favorate, Tan Hou kaj liaj armeanoj detenis la trupojn de la kortego en 7 jaroj. En la 6-a de la sesa monato de 1372 laŭ la ĉina luna kalendaro Tan Hou viktimiĝis. Poste ĉiujare en tiu tago tuĝja-oj faras ceremonion por rememorigi la heroon.

La kajakisto fiere diris al ni, ke Tuĝja-nacio estas nefleksebla. Oni pesis ĉiun novnaskitan knabon, elektis feron tiom pezan kiom la knabo kaj trempis ĝin en akvo kun drogo. Kiam la knabo fariĝis 18-jara, oni fandis la feron kaj faris el ĝi glavon, por ke la knabo povu sin defendi per ĝi kontraŭ malamikoj.

Nun la antikva moro jam fariĝis ludo de drivo. Kiam du kajakoj renkontiĝas, komenciĝas akvobatalo sendeklare. En nia kajako troviĝis 12 homoj. Post multfoja atakado ni tro-

vis, ke tuĝja-a knabo sekvas nin en boato, kaj ekkomprenis, ke li volas liveri al ni "armilojn". Sekve ni aĉetis ĉe li kalabasojn, akvoĉerpilojn kaj akvopafilojn faritajn el bambuo kaj atakis aliajn drivantojn senarmajn. Tiam la knabo turnis sin al ilia kajako por savi ilin.

Senĝenaj estas drogherbokolektantoj sur la rivero. Laŭ klifo ili remas kaj serĉadas. La kajakisto diris, ke antaŭe estis neniu ŝoseo, kaj drogherboj, uruŝio kaj ligno en la montaro kaj salo kaj lamp-oleo ekster la montaro estis transportitaj per la rivero. En pluva sezono ligna boato kaj bambua floso ofte estis renversita kaj detruita, sed en seka sezono ili estis tirataj de haŭlistoj, kiuj piede kreis longan mallarĝan vojon laŭlonge de la montpiedo. Kiam ne troviĝis vojo, ili eniris en la akvon por tiri boatojn. Ĉu sur akra ŝtono ĉu en frosta akvo ili estis ĉiam nudpiedaj. La rivero plenis de iliaj larmoj kaj sango, sed nun sur la vojstreko kreskas belaj floroj kaj verdaj herboj, kaj rido aŭdiĝas ĉe Maoyan-rivero. ■



Drivantoj sur Maoyan-rivero



# Masko

de SAITGARAJEV V. A. (Rusio)

Mi malamas vin  
 Mi malamas maskon vian  
 Kun kiu vi ludis per mi  
 Por kio mi estis punita per di'?'  
 — Nun tuj, diru al mi.  
 Ho, di'! Kion mi faris ne tiel por ŝi?  
 Mi ĉiun tagon la florojn alportis  
al ŝi  
 Mi kisis la lipojn de ŝi  
 Mi amon konfesis al ŝi  
 “Ni estos kune”, ŝi diris al mi  
 Ho, ve! Sed ne okazis tio  
 Mi malamas tagon  
 Kiam unue renkontiĝis kun vi  
 Ĉu mi povos forgesi pri vi? —  
 Ho, di'!  
 Verŝajne ne. Mi povos ne.  
 Sed por forgesi vin rapide  
 Mi konatiĝos kun fraŭlin' alia  
 Kiu ne estos tia kiel vi  
 Kiu sen masko estos  
 Kiu ne ludos, kiel vi per mi  
 Mi malamas vin  
 Kaj di' juĝist' al tiu estas  
 Li vidis ĉion  
 Kun ni okazis kio.  
 En impeto de l' pasi', mi nenion  
scias pri vi  
 Pri viaj voluptemaj ludoj  
 Pri okuloj nukleaj viaj  
 Frenezigitaj ĉiuj  
 Al mi ŝajnas, ke mi ne estis sola  
tia  
 Kredinta en feliĉo tiun nian  
 Kiu estis, donis unu al alia  
 Por ke ĝi revenu  
 Demetu maskon tiun  
 Masko de malbon' kaj masko de  
malĝoj'  
 Mi tuj al vi pardonos ĉion  
 Ĉe vi aperu la ridet'  
 Kiel per blu' ekludos antaŭe  
okulojn.  
 Forbruligu maskon tiun  
 Ĝi per blua flamo brulu  
 Malbono kaj malĝojo brulas kune.

# Blanka standardo!

de SUZAN SOMALI (Irano)

Signeton... signeton...  
 Serĉante signeton, kies svingeto  
 anoncu pecon da paco.  
 Ho... ektroviĝis ĉifoneto...  
 — ligita ĉirkaŭ piedeto  
 piedeto de blanka kolombeto!  
 ...  
 Signeton... signeton...  
 Malliginte la ĉifoneton...  
 ho...  
 Svingegis standardo blanka!

# Kial la homoj apartiĝas?

de JULIUS BALBIN (Usono)

Mi tute ne povas kompreni,  
 kial la homoj devas ĉiam apartiĝi  
 unuj disde la aliaj.  
 Ĉu la tuta homaro  
 ne retroviĝas sole en sia unueco?  
 Kial tiu morba manio de l' homoj  
 ĉiam iamaniere distingiĝi  
 unuj disde la aliaj  
 ĉu per la raso,  
 ĉu per la nacieco,  
 ĉu per la religio?  
 Ĉu la destino  
 de l' unueca homaro  
 iam povus realiĝi  
 en ties vivo  
 kiel elementoj apartaj  
 kaj reciproke malamikaj?  
 Ĉu eble Dio mem,  
 se li ekzistas,  
 ordonis vivi tiamaniere?

# Malavantaĝo aŭ avantaĝo?

**I**ATEMPE malavantaĝo ne estas malbona kaj povas ŝanĝiĝi en avantaĝon.

Iun 10-jaran knabon trafis trafika akcidento. Li perdis la maldekstran brakon, sed li volis lerni ĵudon.

Li petis iun ĵudomajstron kiel instruiston kaj eklernis ĵudon. Li diligente sin ekzercis, sed ne komprenis, kial la majstro instruis al li nur unu artifikon en 3 monatoj.

Malpacience li demandis la majstron: “Ĉu mi povus lerni aliajn artifikojn?”

La majstro respondis: “Estas sufiĉe por vi lerni unu artifikon.”

La knabo ne sciis la kialon, sed li kredis sian majstron kaj daŭrigis la ekzercadon.

Post kelkaj monatoj la majstro partoprenigis la knabon unuafoje en konkurso. La knabo ne atendis, ke li facile gajnis du matĉojn kaj eniris en la trian. Per sia artifiko li superruzis la rivalon kaj venkis, kvankam li renkontis malfacilon.

En la finalo la knabo luktis kun pli alta kaj forta rivalo, kiu estis tre sperta. La knabo tiam falis en pasivecon. Por evitigi al la knabo eventualan vundon, la juĝisto ĉesigis la konkurson, sed la majstro petis daŭrigi la finalon.

La finalo rekomenciĝis. La rivalo malstreĉiĝis. La knabo per sia artifiko subigis la rivalon kaj fariĝis ĉampiono.

Sur la vojo de hejmvveno la knabo kaj la majstro retrorigardis

la konkurson. La knabo demandis: “Majstro, kial mi povas fariĝi ĉampiono per nur unu artifiko?”

La majstro respondis: “Estas

du kialoj: unue, vi ellernis la plej bonan artifikon de ĵudo; due, kiu volas venki vin, tiu devas kapti vian maldekstran brakon.” ■



# Bano utilas al sano

de GAO WEN

**B**ANO estas ne nur puriga, sed ankaŭ utila al funkcio de la ŝvitaj glandoj, altigo de la kapablo rezisti kontraŭ haŭtaj malsanoj, reguligo de la nerva ekscitiĝo kaj mildigo de la mensa kaj korpa laco, kaj utila al dormo, sangocirkulado en la tuta korpo kaj plibonigo de la organisma nutro. Sube estas banoj ofte farataj.

**Medikamenta bano:** Jam antaŭ pli ol 3 000 jaroj en Ĉinio estis moska bano. Laŭ ĉin-medicina teorio mosko estas valora medikamento kaj bano en akvo kun mosko estas utila por vigligi la spiran sistemon kaj koran funkcion kaj akceli ekskrecion de diversaj glandoj. En la lastaj jaroj ekfuroris laminaria kaj alispecaj banoj. Laminario entenas abundon da proteino kaj vitaminoj kaj dekojn da mikroelementoj. Se oni banas sin en akvo kun pulvoro, tablojdoj aŭ emulsio el freŝa laminario, tio estas utila al antisepto, muldigo de korpulenteco, laco kaj sendormeco kaj kuraco de artrito, psorazio k.a.

**Varmakva bano:** Ĝi estas utila al purigo de la haŭto, al metabolo, nerva ekscitiĝo, muskola malstreĉiĝo, dilatiĝo de sangovazoj, sangocirkulado, malleciĝo kaj kuraco de artrito, reŭmatismo kaj iuj haŭtaj malsanoj, sed ĝi estu farata ne tro longe por preventi kolapson.

**Malvarmakva bano:** Ĝi estas utila al kuntiriĝo de la haŭtaj kapilaroj, kiu kaŭzas refleksan kongeston kaj akcelas la haŭtan metabolon, ekskrecion de

sebumaj glandoj kaj nutras la haŭton. Kiu ofte faras malvarmakvan banon, tiu havas delikatan kaj elastan haŭton kaj sanan belecon. Tial oni nomas malvarmakvan banon sangovaza gimnastiko. Krome la malvarmakva bano utilas al la spiraj kaj digestaj organoj kaj preventas infektiĝon de la supra spira kanalo, reŭmatismom, artriton kaj aliajn malsanojn. Ĝenerale oni ne devas tuj trempi la tutan korpon en malvarma akvo, sed iom post iom. Komence oni malsekigas la vizaĝon, kapon kaj piedojn kaj poste la tutan korpon per duŝo. Aŭtune kaj vintre la bano daŭru maksimume du minutojn, precipe por komencantoj.

**Bano alterna per varma kaj malvarma akvo:** Faru unue la varman banon por dilati la sangovazojn kaj tuj post tio la malvarman por ilia kuntiriĝo. La alterno povas doni al la sangovazoj bonan eksciton kaj pliigi akomodon de la korpo al varmo kaj malvarmo, sekve ĝi estas efika precipe al menslaboruloj. La alterna bano estas utila ankaŭ al kuraco de neŭrastenio kaj hipertensio. La alternaj fojoj kaj tempo devas esti deciditaj laŭ la kondiĉoj de la baniĝantoj. Mi proponas fari tion 1-3 fojojn ĉiuse-

majne kaj konstante.

**Sunbano:** La transviolaj radioj estas utilaj al antisepto kaj desinfekto. Ili povas eksciti la haŭton, akceli sangocirkuladon. Kaj krom tio la transviolaj radioj estas utilaj al sangoproduktado kaj al organaj ĉeloj en asimilo de oksigeno kaj en metabolo kaj pliigas la organisman imunecon. Sed ĉiufoje sunbano devas esti farata malpli ol duonhoron, kaj tro longa bano kaŭzas haŭtajn malsanojn pro tro da transviolaj radioj.

**Arbara bano:** La verdaj plantoj povas sorbi karbonan dioksidon kaj ellasi oksigenon. La arbopintoj povas transigi la negativan elektron de la tero, sekve la aero riĉas je anjono kaj estas tre freŝa. Anjono estas efika por kvietigo, endormigo, maljukigo, stabiligo de la pulsa ritmo, mallevo de sangopremo, ekscito de apetito, malleciĝo k.a. Faru la arbaran banon tiamaniere: Promenu en arbaro, faru gimnastikon kaj profundan spiradon, tiel ke vi estos ekscitata de malvarma aero kaj malstreĉita kaj vigla, tamen gardu vin kontraŭ atako de serpentoj kaj insektoj.

**Bano en termofonto:** La akvo de termofonto ĝenerale estas formita de pluvo kaj tersurfaca akvo, kiu sinkis en profundan terkruston. Ĝia temperaturo estas pli ol 20 °C. Ĉar ĝi estas minerala akvo kun fluoro, magnezio, kalcio, kalio kaj radiumo utilaj al la homa sano, ofta bano en termofonto estas efika por kuraco de artrito kaj haŭtaj malsanoj. ■



En termofonta banejo



## Lotus-lanterno

Temas pri mito kiel Chenxiang savis sian patrinon.

Diino Sanshengmu enamiĝis al Liu Yanchang, klerulo en la surtera mondo. Ŝia frato, dio Erlang, firme tion malaprobis. Ŝi senhezite descendis al la homa mondo por ĝui feliĉan vivon. Dio Erlang venis kapti ŝin, sed li retiriĝis antaŭ la magia forto de la lotus-lanterno de Sanshengmu. La lanterno estas magia kaj povas venki la fiulojn kaj doni feliĉon al la bonkoruloj.

Poste Liu Yanchang mortis kaj Sanshengmu sola flegis la filon Chenxiang.

Foje Chenxiang senatente tuŝis la lotus-lanternon, kaj ĝi ekbrilis. Dio Erlang vidis la ekbrilon kaj forŝteligis Chenxiang.

Diino Sanshengmu iris al dio Erlang por repreni de li sian filon. Sed Erlang rifuzis redoni la infanon kaj forrabis la lanternon. Krome li metis Sanshengmu sub Huashan-monton.

Chenxiang en la ĉiela palaco volis savi sian patrinon kaj la tera dio diris al li, ke li sin turnu al simioreĝo Sun Wukong. Dank' al helpo

de simieto Chenxiang reakiris la lotus-lanternon kaj serĉadis Sun Wukong en la surtera mondo. Post kelke da jaroj elkreskis Chenxiang. Iom post iom li komprenis, ke oni devas fari ĉion per si mem. Sun Wukong donacis al li blankan ĉevalon kaj diris, ke la magia hakilo povos helpi lin savi la patrinon.

En la brilo de la lotus-lanterno, Chenxiang kuraĝe batalis kontraŭ dio Erlang. Fine li trahakis la monton kaj savis sian patrinon.

La bildlibro estis adaptaĵo de movbilda filmo kun la sama titolo. Simplaj tekstoj por la belaj bildoj estas facile legeblaj.

112 p. 165x225 mm.  
Prezo: 8.00 USD  
Sendokosto: 3.00 USD  
Mendu ĉe:

- Distribua Fakoj de EPC
- Libroservo de UEA
- Nia peranto en via lando



## La Familio

“La Familio” rakontas pri granda feŭda familio el kvar generacioj. Ĝi priskribas la amon inter gejunuloj, la kruelan persekuton de la feŭda etiko al virinoj kaj ilian tragikan sorton. La aŭtoro estas Bakin, fama ĉina verkisto kaj veterana esperantisto. Li modlis serion da karakterhavaj personoj per forta arteco kaj enkorpiĝis sian amon kaj malamon en tiujn rolojn de la romano por montri sian belan idealon.

1999. 572 p. 889 x 1230 mm. Ilus. Bind.  
Prezo: 22.00 USD    Sendokosto: 5.00 USD  
Mendu ĉe: ● Distribua Fakoj de EPC  
● Libroservo de UEA  
● Nia peranto en via lando



## Cent Ĉinaj Fabloj

La libro enhavas cent fablojn el la antikva Ĉinio, kaj multaj el ili estis verkitaj de filozofoj, kio pliprofundigis la filozofion de tiuj fabloj. Delikataj ilustraĵoj donas artan plezuron de alia kategorio.

1999. 160 p. 787 x 1092 mm.  
Prezo: 6.00 USD    Sendokosto: 2.00 USD  
Mendu ĉe: ● Distribua Fakoj de EPC  
● Libroservo de UEA  
● Nia peranto en via lando



# Bambuoj



Bambuoj apartenantaj al la graminacoj estas ŝatataj kaj laŭdataj pro siaj nobleco, firmeco, beleco kaj verdeco. Iu artisto tiel prikantis ilin: iliaj ĉiam verdaj folioj simbolas humanecon, iliaj firme starantaj trunkoj — justecon, iliaj kavaj tuboj — ĝentilecon, iliaj fortikaj kaj elastaj branĉoj — saĝon kaj iliaj senŝanĝaj vejnoj — lojalecon. La 15-an de junio 1993 la Ĉina Poŝta Administrejo emisiis poŝtmarko-serion el kvar pecoj kaj unu poŝtmarkan blokon pri bambuoj.



Turo de la Imperiestra Palaco en Pekino

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》二〇〇〇年第十一期  
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2